
ISSN 0984 7626

# evangeliaj kajeroj

## UNUECO



6
1989

"por ke ili ĉiuj
estu unu"

# EVANGELIAJ KAJEROJ

*internacia kristana revuo en Esperanto*

---

Ni daŭre serĉas kunlaborontojn. Se vi deziras kunlabori, vi povas peti instrukciojn. La *artikoloj* estas petataj, sed vi povas libere sendi mallongajn *kontribuaĵojn*, *recenzojn*, *noticojn*, kiuj iel rilatas al la temo. Vi ankaŭ povas fari intervjuojn, poste tradukitajn.

La aŭtoroj respondecas pri la enhavo de la propra artikolo.

---

Redakcio, administracio : Philippe Cousson, 26 Rue de Pré Ventenet, F-86340 Nouaillé Maupertuis, Francio ; tel. 49 46 80 21, el eksterlande 33 + 49 46 80 21.

---

*Directeur de la publication : M. Philippe Cousson.*
*Dépôt légal : février 1990.*
*Editeur : Philippe Cousson, Nouaillé-Maupertuis.*
*Imprimé par Michel Brun SARL, Poitiers (12 rue des Frères Lumière, Beaulieu, BP 252, 86006 Poitiers Cedex).*

**Unueco, ekumenismo, kunlaboro, interŝanĝo, konkordo, diskutoj, kuncelebro.** Pli kaj pli la diversaj eklezioj komencas kunekzisti, anstataŭ ol simple apudekzisti, se ne kontraŭekzisti.

Se la ekumena dialogo estiĝas kun la supozo, ke "la aliaj alvenu al la vero (la nia !), al la ĝusto (la nia !)", ĝi neniam sukcesos !

Sed, se oni pensas, ke Dio parolis al ĉiuj kristanoj same, donacis al ili tion, kion ili bezonis, permesis al ili atesti pri la Evangelio, tiam eble la dialogo havas ŝancon komenci sukcesi. Kiam oni rigardas la alian kiel fraton, amatan de Dio, savatan de Dio, tiam oni povas aŭskulti lin, eble ekkompreni lin.

La Eklezio estas diversa (vidu 1 Kor 1:12) en la opinioj, en la tradicioj, sed unu en la Savanto, unu antaŭ la Vorto de Dio.

Kompreneble ni neniam estos ĉiuj kun la sama opinio, kun la sama sento, sed ni restas kun la sama Dio, kun la sama Spirito Sankta, kun la sama Sinjoro.

Cu mi aŭdacus diri, ke la unueco, por kiu preĝis Jesuo, ne estas por fari, ĝi jam estas, sed ke ni devas simple (?!) vivi ĝin.

P.C.

---

Mi volas peti pardonon pro la prokrasto de ĉi tiu numero. Eble vi jam scias, ke post la forpaso de Jan van Keulen, mi ricevis la redaktadon de ***DIA REGNO***. Por tio, mi estis ekipita de komputilo, per kiu mi faris ĉi tiun numeron. Mi devis organizi mian laboron kaj alkutimiĝi al la maŝino, kaj tuj ekagi por ***DIA REGNO***, kiu estas monata. Nun mi esperas, ke de nun ĉio iros glate.

P.C.

## POR KLARE UZI KELKAJN TERMINOJN

En la unuaj instrukcioj por la *Evangeliaj Kajeroj*, mi konsilis la jenajn difinojn por la jenaj vortoj :

**evangelia** : rilata al la Evangelioj, al la Evangelio, uzata en la nomo de denominacioj, ĉefe luteranaj, en kelkaj landoj. Oni ne uzu ĝin kiel ekvivalento de "protestanta".

**evangelika** : angle *evangelical*, france *évangélique*, germane *evangelikal*, rilata al specifa teologia skolo, ankaŭ dirata fundamentisma, ortodoksa, konservema. La ano estas **evangeliko**.

**evangelizo** : france *évangélisation*, angle *evangelism* kaj *evangelisation*, anonco de la Evangelio, cele al konvertiĝoj, ne necese tujaj. La verbo estas **evangelizi**, la homo la **evangelizisto**. La evangeliisto estas tiu, kiu verkis Evangelion.

**ekumena** : rilata al la Eklezio tra la tuta mondo. Ne uzu por indiki ion ekster kristanismo (Origine, etimologie, la vorto signifas la tuta loĝata tero, sed post la alpreno fare de la ĝeneva konsilantaro, la signifo komunsence malvastiĝis). La **ekumeno** estas la tutmonda kristanaro. Ekster kaj preter kristanismo oni uzu prefere "**interreligia dialogo**".

**ekumenismo** : movado, strebo por kuniĝo de la kristanoj.

**ekumenisma** : rilata al ekumenismo. Tiam oni ne uzu "ekumena".

**konfesio** : unu el la grandaj kristanaj familioj, kiu ĝenerale baziĝas sur **kredokonfeso**. Ekz-e **kalvinana**, **luterana**, **romkatolika**, **ortodoksana**, **baptista**, **anglikana**, **metodista**.

**denominacio** : nomo de eklezia organizo. En la sama lando povas esti pluraj denominacioj de la sama konfesio.

Philippe Cousson

## EKUMENISMO : AMO AL DIO KAJ PROKSIMULO

La jaro 2000 proksimiĝas. Tio estas 2000 jaroj post Kristo. En al veno de Kristo, la mondo ricevis novan numeradon de jaroj. Sed komprenenble, ne nur tion. Komence de nia jarcento itala filozofo ne kristana diris : "Ni ne povas diri ke ni ne estas kristanoj", por esprimi kiom multe kristanismo eniris la homan historion. Sed, ĉu vere nun la mondo estas kristana ? Inter jes kaj ne, mi respondus : ne. Ne konsiderante la popolojn kiuj fariĝis kristanaj, oni povas vidi, ke la kristanaj nacioj ofte vivas en epikura situacio de konsumemo, kaj ke agnostikismo disvastiĝas. Kristanismo estas, sed ĝi estas pli tradicio ol reala valoro. Certe, ekzistas homoj kaj grupoj en multaj landoj, kiuj havas fortan kristanan vivon, sed ni ofte konas ilin, ĝuste ĉar ili estas esceptoj. Kutime ni vidas kaj renkontas homojn kaj popolojn pri kiuj oni ne povas diri, ke Kristo estas lumo de ilia vivo. Ankaŭ nuntempe militoj, perfortoj, subpremo estas normalaj aferoj inter homoj. Du mil jarojn post Kristo, la mondo estas plejparte konvertenda. Kvankam ĉiutaga kaj kutima, ĉi tiu afero devus esti grava por kristanoj.

### Grava malbona afero

En tia situacio, almenaŭ la sekvantoj de Kristo devus dubi, ĉu ili estis kaj estas vere bonaj kristanoj. Dubi, ne necesas tuj kulpigi sin. La malbono ekzistas de la komenco kaj verŝajne ne malaperos. Sed tiu dubo estas grava, kaj certe necesas dubi pri la fenomeno, ke ili apartigas sin en multaj eklezioj, kiuj ofte batalas inter si. Dubo povas fariĝi certeco, la certeco ke ni, kristanoj, malobeis la mesaĝon de Kristo. Li volis, ke la sekvantoj estu unu, unuiĝintaj en unu nura Eklezio. Tiun deziron ni bone konas, ne necesas mencii la koncernajn vortojn de la Evangelio.

La disiĝo en pluraj eklezioj estas "skandalo". Ĉi tiu vorto ne estas tro forta, se ni ne nur pensas, ke la Fondinto fondis nur unu Eklezion, sed ankaŭ pensas pri la impreso, kiun disiĝintaj kristanoj prezentas en

---

DIVERSECO DE LA EKLEZIOJ, INTEREKLEZIA DIALOGO · DIVERSITÉ DES ÉGLISES, DIALOGUE ENTRE ÉGLISES · VIELFALTIGKEIT DER KIRCHEN, ZWISCHENKIRCHLICHER DIALOG · DIVERSIDAD DE LAS IGLESIAS, DIÁLOGO ENTRE IGLESIAS · DIVERSITÀ DELLE CHIESE.

misioj : ili komunikas, disiĝinte, la kristanan leĝon de amo kaj de universala frateco. La katolika **Vatikana Koncilio** mem uzis la vorton "skandalo". Oni povas tuj kompreni ke la pluraj eklezioj, kvankam ili multe predikas, ne povas posedi plenan profetan povon ĉar mankas la unueco al ili atribuita. Tian ne plenan profetecon bone komprenas kaj spertas la kristanoj kiuj vivas ĉe "landlimoj" de kristanismo, ekz-e en misioj. Sed tion dekovru ankaŭ kristanoj kiuj vivas en homogenaj situacioj, kie apartiĝo de eklezioj ne estas kutime sentata kiel problemo, ekz-e katolikoj vivantaj en Italio aŭ en Pollando, luteranoj en Norda Eŭropo, anglikanoj en Anglio aŭ ortodoksanoj en Grekio, ja ili ofte troviĝas en homogena situacio, kaj nevole lasas flanke la problemon de disiĝo. Tamen ĝi ekzistas, kaj samtempe ankaŭ en ĉi tiuj "homogenaj" landoj la kristanismo perdas terenon : kristanismo fariĝas nur tradicio kaj kristanoj ne kapablas esti profetaj.

Do ni ĉiuj, katolikoj, reformitoj, anglikanoj, ortodoksaj kaj aliaj, devas rigardi la horizonton iom pli larĝa ol tiu de la propra eklezio, kaj ekrimarki ke aparteco de eklezioj, kvankam multaj el ni ne "tuŝas ĝin per manoj", estas **grave malbona afero**. Facile ni konstatas, ke ĉiu eklezio pensas ke ĝi gravas, kaj ni povas konkludi, ke nenia (eĉ ne nia propra) estas la Eklezio kian Kristo volis (almenaŭ ĝis kiam apartigo ekzistas). Kredante ke se ni estus bonaj kristanoj, la ununura Eklzeio, kiel la Fondinto ĝin volis, ekzistus, ni povas ekdubi, ĉu oni en iu ajn aktuala eklezio vivas kaj predikas la Evangelion en kompleta kaj aŭtentika maniero. Laŭ la faktoj, la vivo kaj predikado en ĉiuj eklezioj ne forprenis ĝis nun la disiĝon.

Grava estas la aŭtentikeco de la Evangelio ; grava ke la disiĝo estas skandalo ; grava estas ankaŭ la konvertenda mondo. Por ekspliki la aferojn estas bone ke ni komence ne forĵetu ian ajn hipotezon. Ekster dubo estas la ekzisto de bonaj kaj sanktaj kristanoj en ĉiuj eklezioj. Konsiderinda estas la ebleco ke en ĉia eklezio oni tro reliefigis iun trajton de la Evangelio, kaj ke per tiuj troigoj unuiĝo ne povas ekzisti.

**La esenco**

Certe en nia jarcento ekumenismo marŝis pli rapide ol antaŭe. Naskiĝis la **Ekumena Konsilantaro de Eklezioj**, kaj finfine ankaŭ la katolika eklezio moviĝis danke al la ekumena **Dua Vatikana Koncilio**. Sed dum la lastaj jaroj ekumenismo ne progresis ; malfruiĝas la atingo de la celo :

la unuiĝo de ĉiuj kristanoj. Unuiĝo, kiam ĝi okazos, okazos danke al la Sankta Spirito. Disiĝo ekzistas kaŭze de homoj, do ili mem devas fari ĉion eblan por iri al unuiĝo. Fari ĉion kaj esplori ĉion ; kaj dum ekesploro estas bone ke oni ne forĵetu, kiel dirite, ian ajn hipotezon. Mi mem faris hipotezon. Ŝajnas al mi ke la apartiĝo mem sugestas unu vojon al unuiĝo. Kompreneble ankaŭ ĉi tiu vojo petas al ĉiu kristano partoprenon en diskuto pri kelkaj aspektoj de propra kredo kaj de propra eklezio. Diskuti ne signifas kaŝi, sed povas signifi kompreni en nova maniero, transloki supren aŭ malsupren en la gamo de valoroj.

Jen la vojo al unuiĝo kiu venas rekte el la aktuala disiĝo : kristanoj havas kelkajn komunajn punktojn per kiuj ili malunuiĝas. Kial ne pensi ke la plej grava enhavo de nia fido konsistas precize el komunaj punktoj ? Ĉu la disigantaj punktoj ne povus esti malpli esencaj ol ni, unuopaj, ĝis nun opinias ?

**Problemoj**

Tio, kion mi proponas, ne estas simpla forgeso de disigantaj punktoj, sed estas iom pli forta,propono : konsideri neesencaj por la kredo la punktojn kiuj disigas. Eĉ se al luteranoj aŭ al katolikoj aŭ al aliaj iu ajn disiga punkto ŝajnis ĝis nun esenca. Ekzemple : graveco de **Tradicio** estas malakorda punkto inter katolikoj kaj luteranoj. Sed mi demandas : ĉu el ĝia graveco konsistas la esenco de kristanismo ? Ĉu la esenco ne povus konsisti el la Sankta Skribo, kiel ili ĝin kune kredas ? Ambaŭ eklezioj konkordas pri la Sankta Skribo, ambaŭ konkordas, ke ĝi ne estas plezura romano, sed forte rilatas al nia vivmaniero. Ĉu tio ne povus esti firma punkto de komuna kredo ?

Alia problemo inter eklezioj estas la funkcio de **Papo** kaj de episkopoj. Mi demandas : ĉu precize tie estas la centro de la kristana mesaĝo ? Kiam Jesuo estis petata diri la plej altan ordonon, li respondis : amu Dion, amu la proksimulon. Li ne respondis : obeu la Papon, nek : malobeu la Papon. Do Papo ne estas la centro de nia kredo, la Eklezio ne estis fondita por la Papo, sed eventuale Papo por la Eklezio.

Mi opinias, ke katolikoj povas konsenti pri reĝustigita papa funkcio, tute servanta la Eklezion, kaj aliaj kristanoj povas konsenti pri funkcio servanta. Fakte ĉiuj devus konsenti ke vera kristano mezuriĝas laŭ amo al Dio kaj al proksimuloj.

# EVANGELIAJ KAJEROJ

Pri la problemo de **Eŭkaristio** : ambaŭ, katolikoj kaj reformitoj ĝin celebras, sed malsimila estas la signifo de la ĉeesto de Jesuo Kristo. Sed al ambaŭ ĉi tiu ĉeesto estas Mistero, do mi demandas, ĉu estas tiel grava la preciza difino de ĉeesto de Jesuo ? Des pli ke ĝi nepre daŭre restas Mistero.

## Ne nur teologia

Mi tute ne estas teologo, mi nur aludis kelkajn problemojn, kiuj certe rajtas ricevi pli profundan studadon. Sed kvankam mi ne estas teologo, mi legis ke teologoj de ĉiuj eklezioj ne estas tiel malproksimaj unu al alia kiel oni tuj povus pensi. Post jarcentoj de apartiĝo, la apartiĝo konsistas multe el tradicioj, vivmanieroj (ĉe altaj prelatoj kaj ĉe simplaj kredantoj), liturgioj : ĉiuj neesencaj problemoj. Ĝi ne estas nur teologia afero.

Mi ne daŭrigas alporti ekzemplojn pri **venkeblaj malakordoj** inter eklezioj. Oni scias ke ili inter katolikoj kaj anglikanoj estas pli facile venkeblaj ol inter katolikoj kaj luteranoj. Sed mi volas denove esprimi la "filozofion" de ĉi tiu alproksimado de kristanoj :

1-e Oni devas esti konvinkita pri la grava malbono de apartiĝo de eklezioj ;

2-e Oni devas esti preta ekzameni kritike la tradician fidon ricevitan en propra eklezio : kritiki estas savi la esencon de kredo,

3-e kaj loki supren ĉi tiun esencon kaj sub ĝi neesencajn aspektojn de fido.

## Ni konvertiĝu

Kritika ekzameno estas radikala kaj ne facila paŝo. Tamen, mi opinias ke ĉi tiu vojo al unuiĝo, krom farenda, ankaŭ estas farebla. Kiam oni rigardas kion oni per ĝi povas savi, kiel estas **komuna fido** de eklezioj, oni multe savas : amo al Dio, amo al la proksimulo, bapto, eŭkaristio, pento, pardono, fina juĝo, kaj ne nur tion. Kial ne pensi ke ĝuste ĉi tie estas la centro de la kristana fido ? Se ni ĉiuj jam kune kredas tion, ĉu estas tiel malfacile postmeti la aliajn apartigantajn problemojn ? Mi opinias ke jarcentoj de disiĝo kaj plemikoj kondukis ĉiun eklezion iom for de la centro rilate al la esencode la Evangelio ; kaj ĉiu eklezio iom tro konsideras kelkajn apartigantan flankon de fido.

EVANGELIAJ KAJEROJ

Ekumenismo postulas ke kristanoj kaj eklezioj ŝanĝiĝu, aŭ ni diru, konvertiĝu. Sed **ekumena konvertado** ne petas, ke katolikoj iĝu luteranoj, aŭ ortodoksanoj iĝu katolikoj, ktp. Laŭ mi, ekumena konvertado petas ke kristanoj el ĉia eklezio celu al la kerno de la evangelia mesaĝo. Kiam oni progresas en ĉi tiu vojo, iom post iom la diferencoj devus aspekti malkreskantaj.

Kiel mi diris, kritika ekzameno kaj tre eventuala forlaso de tradicioj ne estas facilaj. La pensmaniero de ni ĉiuj formiĝis en historio de jarcentoj. Ekz-e : katolikoj povas opinii ke estas "skandale" malpliigi la funkcion de la Papo. Alia ekzemplo : ĉia eklezio povas opinii ke estas "skandalaj" la vidpunktoj de aliaj eklezioj rilate al sakramentoj. Kion fari ? Urĝe revenas la demando : ĉu ne estas skandalo, ke la komunumo de la kristanoj daŭrigas la apartiĝon, kaj ke samtempe la komunumo daŭras ne esti profeta en la mondo ?

Franco Grilli, Italio
el *DIA REGNO*, januaro 1989, pp. 3-4

# KELI ☆ DIA REGNO

Kristana Esperantista Ligo Internacia
Fondita en 1911
Neneŭtrala ligo, kunlaboranta kun U.E.A.

**Celo:** ***Krei efikan kontakton inter kristanoj el diversaj landoj kaj per Esperanto diskonigi la Evangelion pri Jesuo Kristo.***

**Prezidanto:** A. Burkhardt, Ev. Pfarramt, D-7311 Bissingen/Teck, Fed.Resp. Germanujo.

**Sekretario:** E. van Dijk-Kuperus, Koningsmantel 4, NL-2403 HZ Alphen a/d Rijn (Nederlando). ☎ 01720-20222.

**Kotizoj:** Rekta membro kun gazeto, minimume 25 ned. guld. — Membro-subtenanto 37,50 ned. guld. — Membro de IKUE 12,50 ned. guld. — Monsendoj al poŝta ĝirkonto n-ro 5506132 de "Kristana Esperantista Ligo Internacia KELI», van Hogendorplaan 4, NL-3135 CD Vlaardingen.

## DIA REGNO

Oficiala organo de KELI
Fondita 1908

**Redaktoro:** Philippe Cousson, 26 rue de Pré Ventenet, F-86340 Nouaillé-Maupertuis, ☎ 49 46 80 21

**Manuskriptojn** oni sendu nur al la redaktoro!

**Abonprezo** sen membreco en KELI: 21 ned. guld. aŭ egalvaloro. Abonoj kaj anonckostoj pagotaj al la kaso de KELI [vidu supre].

**Ekspedado** de «Dia Regno» kaj membrolisto de KELI: L. Hordijk, van Hogendorplaan 4, NL-3135 CD Vlaardingen.

*Represo kaj traduko permesataj, kondiĉe ke oni citas la fonton. Specimenon kun represo aŭ traduko oni sendu al la redakcio.*

Pri la enhavo de la artikoloj respondecas nur la aŭtoroj.

Monata revuo - maandelijks tijdschrift. ISSN 0167-9554.

# POR KE LA MONDO KREDU

## Dio pentas

Unu el la plej amaraj kaj hontigaj kaj plorigaj vortoj en la Biblio estas laŭ mi, kiam ni legas en la komenco de la historio de Dio kun ni homoj, ke Dio pentis ke Li kreis la homon sur la tero kaj ke Li afliktiĝis en Sia koro. Kaj la Eternulo diris :

> «Mi ekstermos de sur la tero la homon, kiun Mi kreis, de la homoj ĝis la brutoj, ĝis la rampaĵoj kaj ĝis la birdoj de la ĉielo ; ĉar Mi pentas ke Mi ilin kreis.» (Gen 6:6-7)

Nur pro Noa, kiu vivis laŭ la volo de Dio kaj pro tio plaĉis al Dio, Li savis la mondon kaj eĉ ĵuris poste ke Li neniam plu ekstermos la mondon !

## La sendita Filo

Multajn jarcentojn poste, pro la denove faritaj malbonagoj kaj malobeemeco, Dio sendis Sian solenaskitan Filon al la tero, por instrui al ni kiel vivi en paco kaj justeco kaj por montri al ni kio grava mankas al ni, nome la **amo** inter ni homoj kaj la **unueco**, por ke la mondo kredu, ke Dio sendis lin.

Jesuo povus en nia tempo rakonti :

> «Iu sinjoro organizis por ĉiuj siaj samideanoj interfratiĝan feston. Sur la invitilo estis skribite ke ĝi estos sobra, sed bonintenca kaj esenca. Pano kaj vino por ĉiuj, por festi
> ke ni ne povas vivi unu sen la alia,
> ke ni ne rajtas fremdigi nin unu de la alia,
> kaj ke la paco en propra hejmo estas la plej malmulto, kun kio ni povas komenci.

---

AMO, EKLEZIO, DIVERSECO DE LA EKLEZIOJ, ATESTO • AMOUR, éGLISE, DIVERSITé DES éGLISES, TéMOIGNAGE • LOVE, CHURCH, DIVERSITY OF THE CHURCHES, TESTIMONY • LIEBE, KIRCHE, VIELFALTIGKEIT DER KIRCHEN, ZEUGNIS • AMOR, IGLESIA, DIVERSIDAD DE LAS IGLESIAS, TESTIMONIO • AMORE, CHIESA, DIVERSITà DELLE CHIESE, TESTIMONIANZA.

EVANGELIAJ KAJEROJ

Jam baldaŭ venis la reagoj.
Tiuj estis preskaŭ ĉiuj sin retenemaj aŭ eĉ negativaj.
Kelkaj homoj sciis bele formuli tion, sed fakte entenis ilia respondo rifuzon.

Iu skribis : Ni tre bedaŭras, sed ni havas jam mem interfratiĝan feston.
Alia informis : Mi ne volas sidi ĉe tablo kun ĉiuj tiuj aliaj, antaŭ ol mi precize scias, kion ili intencas per tia kunveno.
Tria sciigis ke li ne povas veni, ĉar li dubas pri la akceptebleco de tia festeno.
Denove alia volis scii kiu parolos kaj gvidos.
Kaj tiel unu post la alia nuligis la inviton.
Tio estis amara elreviĝo por la gastiganto.
Ili, kiuj nomas sin plej proksimaj al li, montriĝas fakte plej fremdiĝintaj de li.

Tamen li persistis ke lia festo de unueco kaj interfratiĝo devos okazi. Tial li sendis denove sian invitilon, sed ĉi tiun fojon al ĉiuj, kiuj tiutempe forstrekigis sian nomon, aŭ kiuj estis indikitaj kiel ĝenaj, strangaj, kontraŭvolemaj aŭ kritikemaj.

Li diris ankoraŭ : mia hejmo devos esti plena por la festo de unueco kaj interfratiĝo kaj la unuaj estos denove certe la lastaj...»[1]

## Amu unu la alian

Jesuo instruis ankaŭ al ni, ke ni devas **ami** unu la alian, kiel Li amas nin (Joh 13:34). Tio estas karakteriza signo de la eklezio. Esti eklezio estas : formi komunumon de homoj, kiuj ne nur kredas en la Sinjoro, sed ankaŭ estas servopretaj por en kaj per vivo de servuteco montri la realecon de la vivo kaj de la vorto de la Sinjoro. Sur difinita loko, je certa momento de historio.

Homoj, kiuj foje devas diri "**jes**" kaj foje ankaŭ kuraĝas diri "**ne**". Laŭgrade ke la komunumoj de kristanoj estas tute si mem en la servado al aliaj, tiugrade ili pruvigas la Evangelion de la Sinjoro, por si mem, por la homoj de sia lando, por la tuta monda komunumo.

Mi diris, ke la **amo** estas la karakteriza signo de la eklezio.
**Kune** ni devas vivi kiel gefratoj, por ke la mondo kredu !
La eklezio devas esti signo de la Regno de Dio.
Kiam ĝi estas unu en amo, tiam ĝi estas tia !
Pluraleco ne malebligas nin esti unu.
Ĉiu membro havas sian funkcion en la ununura **korpo** de la Sinjoro.

Sed, diras Julia **Esquivel** en Vancouver (Vankuvero) :

«Se ni, kristanoj, vere kredus ke ni estas unu korpo,
la Korpo de la releviĝinta Kristo,
kiom da situacioj ni povus tiam ŝanĝi !

Tiu eta sinapa semeto povus spilitigi la plej malmolan rokon
kaj ni povus translokigi la montojn de abundeco
por plenigi la ravinojn de la mizero.

Aĥ, se ni vere vivus kiel fratoj kaj fratinoj !
La tero kun ĉiuj siaj trezoroj estus nia Taga Pano
kaj neniam plu ni malbonuzus la nomon de nia Patro.

Kelkfoje la ebleco ke la plej granda ordono
estas epokfaranta ŝajnas ne atingebla idealo.

Ĉu tio estas la kaŭzo kial homoj estas persekutataj
kaj mortigataj, kiuj sincere kredas
kaj klopodas vivi el tiu fido kaj kredo ?»

Ankaŭ Kristo mem spertis tiun malkredon en la ebleco vivi laŭ amo kaj unueco dum sia vivo sur la tero kaj li iris tra la sufero kaj mallumo de la morto kaj tombo por savi nin kaj liberigi nin denove kaj montris per sia releviĝo la sole ireblan vojon de Dio.

Dio renovigis Sian interligon kun ni homoj, la interligon kiun Li faris kun Noa kaj liaj posteuloj, nome ke Li neniam plu ekstermos la mondon.

Sed mi kredas ke Dio ofte ploregas pro niaj faroj de malpaco kaj maljusteco, pro niaj detruigoj de la tuta kreitaĵo, pro nia malamo inter la homoj kaj nia malunueco inter la kredantoj.

## Liberigo

Jes, Kristo liberigis nin de ĉiuj niaj satanaj ligiloj kaj de niaj fi-dioj, kiel ekzemple estas : nia nacia sekureco, al kiu fi-dio ni oferas la plej multan monon por satanaj iloj, kiuj devas "ŝirmi" nin kontraŭ niaj "malamikoj", per kiuj ni eĉ estas pretaj, en "danĝeraj cirkonstancoj", ekstermi tiujn malamikojn kaj detrui la tutan mondon. Kaj tiu grandega fi-dio forŝtelas pro sia mon-avideco la plej necesan nutraĵon por la plej granda parto de la homaro !

Dua fi-dio estas nia deziro kreskigi la ekonomion. Per tio ni fakte jam detruas nian teron. Ĉar ni tute ne bezonas tiujn ne-necesajn produktaĵojn. kaj pro tiaj elspezoj la malriĉa popolo multe suferas, ankaŭ preskaŭ la tuta enloĝantaro de la mondo.

Ankaŭ kristanoj estas ofte obeemaj sekvantoj de tiaj fi-dioj!
Amo kaj unueco tiam ne estas serĉeblaj kaj eĉ ne troveblaj !

Sed Kristo mem ja estas libera ! Kial liaj sekvantoj ne volas esti liberaj ? Jesuo estas libera, ĉar li estis malriĉa. Li estis libera, ĉar li ne serĉis la favoron de potenculoj kaj riĉuloj. Kristo estis eĉ libera en la aspekto de la morto.

Tial lia eklezio devas ankaŭ esti libera. Lia eklezio ne povas esti dependa, certe ne de la potencoj de ĉi tiu mondo.

Amo signifas libereco ! La eklezio estas libera por esti **amo**.

## Kredi, obei

Kiam la eklezio mem lernas kio estas amo, tiam oni bonvenigas ĉiujn kiel la fratojn kaj fratinojn. Tiam ili nur aŭdos la **inviton** de la Sinjoro de la eklezio mem kaj tiam oni nur obeas lin.

Tiam ĉiuj ekleziaj argumentoj pri kio kaj kiom kaj kiel oni kredas senvaloriĝas ; tiam nur gravas la scio **ke** oni kredas en la Sinjoro, kiu donis sian vivon por ni, por ke ni havu vivon abundan.

Nur tiam la mondo povos kredi ke Jesuo estas sendita de Dio por savi la mondon kaj ĉion sur ĝi : la homojn, la bestojn, la plantojn.

Tiam ĉiuj homoj scias ke ili estas vokitaj por la kunlaboro, por krei pacon por ĉiuj, por realigi justecon por ĉiuj kaj por sanigi la preskaŭ detruitan teron por ĉiuj.

Vokitaj kiel partneroj de Dio, kiu ne volas esti nur Dio kiel aŭtokrato, sed kiu volas ke ni kunlaboru kun Li, helpe de Lia Spirito, kiel Liaj administrantoj kun konscio pri respondeco.
Por ke la mondo kredu !

Sed kial atendi ĝis "tiam", ĝis "iam" "tiam" fariĝos ? Kial ne nun realigi tion ? Kial ne nun obei kaj praktiki tiun amon inter ni ? Dio jam tiel longe atendas, ĝis ni faros tion !

**Diversaj**

Amo kaj unueco inter la kristanoj ne nur estas necesaĵo, sed grava ordono de Kristo mem.

Tamen ni povas esti unu en diverseco, kiel ankaŭ la apostolo Paŭlo diras en sia letero al la komunumo de la Korintanoj.

> «Ekzistas diverseco de donacoj, sed la sama Spirito. Kaj ekzistas diverseco de servoj kaj la sama Sinjoro. Kaj ekzistas diverseco de energioj, sed la sama Dio, kiu energias ĉion en ĉiuj.» (1 Kor 12:4,6)

Kaj Paŭlo daŭrigas :

> «al ĉiu estas donita la elmontro de la Spirito por utilo ... al unu la vorto de saĝeco ... aŭ alia la vorto de scio ... aŭ al alia fido ... donacoj de resanigoj ... energioj por mirakloj ... profetpovo ... distingoj de spiritoj ... diversaj lingvoj ... interpreto de lingvoj ; sed ĉion tion energias la unu sama Spirito, disdonante al ĉiu aparte, kiel al li plaĉas.
> ...
> (Nia korpo) havas multajn membrojn ... tamen estas unu korpo ; tiel same ankaŭ estas Kristo. Ĉar en unu Spirito ni ĉiuj baptiĝis en unu korpon. ... Kaj se la orelo diros : Pro tio ke mi ne estas la okulo, mi ne apartenas al la korpo - ne sekvas de tio, ke ĝi ne apartenas al la korpo. Se la tuta korpo estus okulo, kie estus la aŭdado ? ... Kaj la okulo ne povas diri al la mano : Mi vin ne bezonas. ... La membroj prizorgu egale unu la alian.
> Kaj se unu membro suferas, ĉiuj membroj kune suferas kaj se unu

membro honoriĝas, ĉiuj membroj kunĝojas.
Vi do estas la **korpo de Kristo** !» (1 Kor 12:7-27)

Denove resonadas la vortoj de Julia **Esquivel** en ni :
«Se ni, kristanoj, vere kredus ke ni estas unu korpo de Kristo, kiom da situacioj ni povus tiam ŝanĝi !»

Kompreneble neniu homo pensas kaj agas sammaniere. Feliĉe ne. Dio kreis nin kiel diversspecaj kaj diverskapablaj kaj diverspensantaj homoj. Per niaj diversaj eblecoj kaj fortoj ni povas **kune** krei **unuecon**, respektante unu la alian en la respektiva opinio. Sed **kun** ni devas aŭskulti al nia **komisiinto**.

Tiam ni trovos spite de la diverseco la unuecon.

La volo kaj deziro kaj la preĝado de nia Komisiinto devos esti pli gravaj ol la ekleziaj dogmoj, vortigoj, malpermesoj.

Kiom da fojoj kie ajn oni jam legas la preĝon de Jesuo : por ke ili ĉiuj estu unu. Sed ĝis nun neniu eklezio aŭ religia komunumo aŭ grupo aŭ sekto pensas severe pri la plenumo de tiu preĝo. Jesuo povas preĝi ĝis la fino de la mondaĝo, sed plenumi lian deziron ŝajne ne estas realigebla... Elaŭdi preĝojn estas ja la tasko de Dio mem, tion oni jam pensas ek de la komenco de la mondo.

**Kiu kulpas ?**

Sed ho ve, se Dio ne elaŭdas kaj plenumas niajn preĝojn, tiam ni ofte kolere forlasas la preĝejojn kaj eĉ Dion mem. Kaj donas la kulpon al Dio ! Li ne savis la judojn en la dua mondmilito ; Li ne zorgis ke amatoj de ni ne mortis ; Li ne malhelpis ke la loĝantoj de Armenio ne sufokiĝis sub la ruinaĵoj post la terura tertremo ; Li ne antaŭzorgis ke Bangladeŝo ne subakviĝis aŭ nuntempe ne zorgas ke la homoj tie ne mortas pro la sekeco, kiu kaŭzas ke la rikolto detruiĝas ; Li ne malebligas ke katastrofoj ekestas ; Li toleras ke potenculoj torturadas malliberulojn ktp.

Kaj Dio atendadas pri nia elaŭdo kaj plenumo de lia preĝado. Ĉu vere Dio devos atendi ĝis ni **finfine** volas obei kaj ami unu la alian, tiel ke lia preĝo estos plenumata ? Al ni la decido ! Sed pripensu ke la ligiloj

de Dio kun ni estas multe pli mildaj kaj elsavantaj ol la ekleziaj ligiloj. Kompreneble devas ekzisti reguloj, sed nepre ne ekleziaj malpermesoj, kiam Dio mem alvokas kaj invitas nin al Sia tablo por doni al ni panon kaj vinon, nutraĵon por uzi survoje al Sia Regno.

**Kiu korpo ?**

Antaŭ nelonge aperis artikolo en honesta, trankvila kaj singarda rom-katolika monata revuo, nomata *La Heroldo*, en kiu teologoj pledis ke la rom-katolika eklezio ne plu longe transdonu la mezepokan koncepton pri la eŭkaristio, nome ke la pano transformiĝas en la korpon de Kristo. Ĉar tio estas la rezulto de "fatala" mezepoka ŝanĝo.

En la komenco oni konsideris ke la **paroĥo**, kiu kunvenas en la nomo de Kristo, estas la Korpo de Kristo kaj la pano kaj la vino estas la simboloj de tio. Sed en la mezepoko teologoj ŝanĝis tion : la **vera** Korpo de Kristo estas la **Pano**, la **paroĥo** (la eklezio) estas la **mistika korpo**.

**Paroli kaj aŭskulti**

La konata Leonardo **Boff** el Brazilo diras :

> «En la komunumo, kiu naskiĝis el la kredo, ekzistas momento de aŭdo kaj momento de parolo, ekzistas tempo de legado pri la revelacio kaj tempo atesti pri ĝi.
>
> **Instruado** kaj **lernado** estas du determinaĵoj de unu sama religia komunumo, estas su admonantaj vortoj kiuj montras kvalifikon de du aplikoj de la tuta komuneco.
>
> La lernado kaj la instruo formas do du funkciojn de unu sama eklezio. Ili ne estas du partoj de aŭ en la eklezio.
>
> Oni parolas pri reciproka lernado.
>
> En la eklezio ekzistas momento, kiam la hierarkio devas aŭskulti al la Skriboj ; devas atenti la signalojn de la tempo ; kaj observi la plendadon de la malriĉuloj, kiuj leviĝas al la ĉielo ; kaj distingi kio estas la volo de Dio por ĉiuj.

> Sed ankaŭ ekzistas en la eklezio momento, kiam la laiko devas paroli kaj atesti pri la vero de la Evangelio, ene de la socia sistemo en kiu li vivas.
>
> Tiam la hierarkio sentas sin membron de la "lernanta eklezio" kaj la laiko sentas sin membron de la "instrua eklezio". Ĉiu estas instruisto kaj lernanto, unu de la alia kaj ĉiuj estas membroj de unu korpo kaj sekvantoj de la Evangelio.
>
> En la ekzisto de ĉi tiuj du funkcioj, unu-apud-la-alia kaj samtempa, oni devas kompreni la alvokon de Jesuo (por ami unu la alian kaj esti unu, por ke la mondo kredu) : ke neniu devas sin nomi instruisto, patro aŭ spirita gvidanto,
>
> ĉar ni ĉiuj estas gefratoj.»[2]

**Timoj**

Mi scias ke nekredantoj ege timas ekumenismon kaj la unuecon de la kristanoj. Ili timas ke ni tiam fariĝos mondan potencon kaj ili timas perdi sian liberecon kaj sekurecon por vivi kiel nekredantoj pri kia ajn religio. Sed tia timo estas ankoraŭ frukto de antaŭaj tempoj, kiam kristanoj ĉiam minacis aliajn kiuj ne povis aŭ volis kredi, per la punado de Dio !

Sed ni ne apartenas al punanta, kolera Dio, sed al amanta Patro, kiu nomas nin infanoj kaj gefratoj de Lia Filo.

Kaj kie eklezioj komencas interparoli pri kuniĝo, kiel ekzemple la du plej grandaj protestantaj eklezioj en nia lando (Nederlando) oni preĝu pri fantazio kaj solvado de ofte tute ne gravaj problemoj pri financaj aferoj kaj kies preĝejon oni ne plu bezonas uzi, ktp. Se oni severe volas kuniĝi, oni certe helpe de la Spirito trovos kontentigajn solvojn.

Ankaŭ ne tiel gravas ke multaj homoj nuntempe forlasas la eklezion, pro kiuj ajn kialoj, nur mi bedaŭras tion por tiuj homoj mem, ĉar ili fortranĉas multan valoron el sia vivo, perdas la esencon de la komuneco. Se ili nur ne perdu la komunecon kun la Sinjoro mem.

## Du aŭ tri

Sed Dio jam estas kontenta se du aŭ tri kunvenos en Lia nomo, en paco kaj amo kaj unueco, ĉar tiam Li estos en ilia mezo !

Kompreneble, diras pastro el Amsterdam :

«Du aŭ tri ne estas multe,
certe ne, se unu estas blinda,
la alia surda kaj tria lama.
Sed tamen du aŭ tri estas multe pli ol nur unu,
certe se unu estas blinda, alia surda kaj la tria lama.
Ĉar la blindulo pruntedonas sian orelon al la surdulo
kaj la surdulo fariĝos la okulo por la blindulo
kaj kune ili portas la lamulon
kaj tiel ili iras ĉiuj tri, kie unu sola ne povas veni.

Du aŭ tri en mia nomo,tio estas la esprimita espero de la Triunuo
pri la infanoj de la homoj.
Kaj ĉie, kie homoj du-kaj-du, aŭ tri-kaj-tri dividas la forton unu kun la alia, kaj portas la malforton unu de la alia, tie Li estas en ilia mezo.
Kun du aŭ tri Li povas regi la mondon kaj Li komencas denove tion, kio ŝajnas ne-ebla :
blinduloj vidas kaj surduloj aŭdas,
mutuloj parolas kaj lamuloj promenas
kaj por tiuj kiuj estas malliberigitaj malfermiĝas liberigita mondo.
Kun du aŭ tri Li kuraĝas entrepreni la miraklon : ke ŝtonoj ŝanĝiĝas en panon kaj akvo ŝanĝiĝas en vinon
kaj soluloj ŝanĝiĝas en fidelajn amikojn.
Kun du aŭ tri, kiuj volas dividi sian panon unu kun la alia, Li revivigas la malsaton al justeco.
Kun du aŭ tri, kiuj levas la pokalon je la estonteco kun ĉiuj, Li vivigas la soifon al paco.
Du aŭ tri ne estas multe, sed por Li estas sufiĉe por nova komenco de renversita mondo, kie silentado ŝanĝiĝas en faradon de vero, kaj fanfaronaĵo aliiĝas en hontecon kaj malhavon.»[3]

## Konsekvence

Ĝis hodiaŭ la malunueco de ni kristanoj estas unu el la kaŭzoj ke regas tiom da malpaco kaj maljusteco kaj malamikeco kaj envio kaj antaŭjuĝoj en la mondo. Dio demandadas al ni ke ni amu unu la alian, ke ni respektu unu la alian kaj tio ankaŭ koncernas nian rilaton al ne-kredantoj aŭ al ne-plu-kredantoj (kiuj eble ne povas kredi aŭ ne plu povas kredi pro niaj internaj kvereloj kaj maltoleremecoj) ; al ateistoj, kiuj neniam ricevis pro nia sinteno ĝustan bildon pri Dio, kiu ja estas amo ; kaj al kredantoj de aliaj mondreligioj, kiuj pro naskiĝo kaj eduko aniĝis ; al serĉantoj pri bono kaj justeco, amo kaj servopreteco kaj paco.

Dio demandadas al ni : "Kiom longe Mi devas ankoraŭ atendi ĝis vi, kredantoj, nomantaj sin kristanoj, plenumas Mian deziron ? Kiom longe Mi devas ankoraŭ havi paciecon kun vi, indulgi vin, toleri vian nunan disigitan staton, ĝis Mia Regno povos veni kaj ĝis Mi povos loĝi inter vi en amo, harmonio, kredo, unueco, paco, mallonge dirite : en ŜALOM ?"

**Unueco** ne temas pri la **estonteco** de niaj **propraj eklezioj**, sed rilatas la **Eklezion** de la **estonteco**.

Do, **unueco** kaj **amo** kaj **paco** kaj **justeco** kaj **bona prizorgo** kaj **konservado** de la tuta kreitaĵaro, **por ke la homoj kredu**, signifas **ĉio** kaj por la **estonteco** de la **Eklezio**, kaj samtempe **ĉio** por la **Eklezio** de la **estonteco** !

Jelly Koopmans-Schotanus, Nederlando

-------------

**notoj :**

1. Pastro Jan van **Opbergen**. - *Verhalen voor de zevende dag* (Rakontoj por la sepa tago).
2. Leonardo **Boff**. - *Wereldwijd Brevier* (Mondvasta breviero).
3. Pastro Jan van **Opbergen**. - forgesita referenco.

La kantemuloj sin turnu al *Adoru Kantante*, n-ro 86.

EVANGELIAJ KAJEROJ

Jelly KOOPMANS-SCHOTANUS, 69-jara, nederlandanino, edzino de Wim KOOPMANS, konata porpaca laboranto kaj esperantisto. Ŝi estas laika reformita pastoro. Ŝi verkis *Preĝo por Ĉiu tago*, tradukita germanen *Bete mit mir*.

**MENDU REKTE ĈE eldonejo**

מרכז סברון

# CENTRO SIVRON


**P.O.K 23180**
**IL-91 231**
**Jerusalem**

Sangopunkto, La, Jeremi Gishron. Jerusalemo: Eldonejo Sivron, 1987. 38p. 14cm. Mimeo. Broŝ. Pensoj pri la koncepto de moninterŝanĝo. Prezo: 6:20 gld.
















Ortodoksa esperantismo; La lukto por unueco, Erco Baraka. Jerusalemo: Eld. Sivron, 1985. 9p. Mimeo. 15cm. Eseo pri la evoluo de la esperantismo dum la fruaj jaroj; kun notoj kaj bibliografio. Prezo: 2:60 gld.

Zamenhof and Esperanto, Norman Berdichevsky. Jerusalemo: Sivron, 1986. 10p. 15cm. Prezo: 2:60 gld.

Zamenhof et l'espéranto, Norman Berdichevsky. Jerusalemo: Eldonejo Sivron, 1986. 10p. 15cm. Broŝ. Prezo: 2:60 gld.

Zamenhof und Esperanto, Norman Berdichevsky. Jerusalemo: Eldonejo Sivron, 1986. 10p. 15cm. Broŝ. Prezo: 2:60 gld.


Zamenhof y el esperanto, Norman Berdichevsky. Jerusalemo: Eldonejo Sivron, 1986. 10p. 15cm. Broŝ. Prezo: 2:60 gld.


Historio de la Esperanto-movado en Israelo (represo el Israela Esperantisto, 1982), A. Wandel (1954). Jerusalemo: Sivron, 1986. 8p. 15cm. Prezo: 1:30 gld.

Unuopaj poemoj (kantoj):
Jerusalemaj Kantoj 0.50 gld.
L'Alf-Beta Kanto 0.50 gld.
La Paca Poeto 0.50 gld.

Lingvo kaj religio; Studo pri la frua esperantismo kun speciala atento al L.L. Zamenhof, Jeremi Gishron (1948). Jerusalem: Sivron, 1986. 212p. 14cm. Prezo: 23:- gld.







Urba oazo, D. Mager (1954) kaj J. Gishron (1948). Jerusalemo: Sivron, 1986. 10p. Ilus. 15cm. Originalaj poemoj. Prezo: 3:- gld.

Mia kara moŝto!; Amikaj poemoj, Erco Baraka. Jerusalemo: Eld. Sivron, 1986. 12p. Ilus. 15cm. Originalaj poemoj. Prezo: 3:- gld.

Eli kaj Jahu; Poemoj el la Sankta Lando, Erco Baraka kaj David Mager. Jerusalemo: Eld. Sivron, 1986. 15p. Mimeo. 15cm. Originalaj poemoj, plejparte rilataj al Esperanto. Prezo. 4:- gld.

Kosma amo, Josef Kohen-Cedek (1903). Originalaj poemoj. Jerusalemo: Sivron, 1986. 14p. Ilus. 15cm. Prezo: 4:- gld.

## INTERKONFESIA DIALOGO : AMo KAJ VERO

### Origina unueco

La Sinjoro Jesuo Kristo deziris kaj petis la Ĉielan Patron en sia sacerdota preĝo, ke liaj disĉiploj "ĉiuj estu unu, kiel Vi, Patro, estas en mi, kaj mi en Vi, tiel ili ankaŭ estu en ni, por ke la mondo kredu, ke Vi min sendis" (Joh 17:21). Kaj la apostolo Paŭlo priskribas la Eklezion kiel korpon, kiu havas multajn membrojn, sed nur unu kapon, Kriston :

> «Ĉar kiel la korpo estas unu, kaj havas multajn membrojn, kaj ĉiuj membroj de la korpo, estante multaj, estas unu korpo ; tiel same ankaŭ estas Kristo» (1 Kor 12:12).

De tio la apostolo derivas praktikan konkludon :

> «Kaj la okulo ne povas diri al la mano : Mi vin ne bezonas : nek same la kapo al la piedoj : Mi vin ne bezonas» (1 Kor 12:21).

La disĉiploj de Kristo diferencas unu de la alia, do ili ne estas memsufiĉaj ĉiu por si mem. Ekzistas interdependeco inter ili, simila al konkludo de diversaj organoj en bone funkcianta korpo. Povas ŝajni, ke kelkaj havas funkcion pli altan kaj pli noblan ol aliaj, sed finfine ankaŭ la plej malgranda fingro de la piedo estas necesa kaj grava por la irado kaj la starado de la korpo.

La apostolo per tiu bildo de eklezio kiel la korpo de Kristo kontraŭas la separatismajn tendencojn de kelkaj kristanoj en Korinto (kaj certe ne nur tie !), kiuj pensis, ke ili sufiĉas al si mem. Simile en la Apokalipso la Sinjoro avertas lokan eklezion aŭ kristanon, kiu diras : "Mi estas riĉa kaj akiris riĉon kaj nenion mi bezonas" (Apo 3:17) kaj forgesus propran malriĉecon, mizeron kaj dependecon.

---

**UNUECO DE LA EKLEZIO, DIVERSECO DE LA EKLEZIOJ, HISTORIA VIDPUNKTO, EKUMENISMO** · UNITé DE L'éGLISE, DIVERSITé DES EGLISES, POINT DE VUE HISTORIQUE, OECUMéNISME · CHURCH UNITY, DIVERSITY OF THE CHURCHES HISTORICAL POINT OF VUE, ECUMENISM · EINHEIT DER KIRCHE, VIELFÄLTIGKEIT DER KIRCHEN, GESCHICHTLICH GESICHTSPUNKT, öKUMENISMUS · UNIDAD DE LA IGLESIA, DIVERSIDAD DE LAS IGLESIAS, PUNTO DE VISTA HISTóRICO, ECUMENISMO · UNITà DELLA CHIESA, DIVERSITà DELLE CHIESE, PUNTO DI VISTA STORICO, ECUMENISMO.

La dependon de la helpo de aliaj ni povas vidi ankaŭ en pli larĝa kunteksto. Neniu loka eklezio aŭ denominacio havas la plenecon de ĉiuj penseblaj spiritaj donacoj. Kiam la Sinjoro donas Sian benon, Li donas al ĉiu "laŭparte" (1 Kor 13:9), kiel plaĉas al Li. Ĉiu ricevis certan konon, certan ĝustan akcenton, utilan ankaŭ por la aliaj.

Dio deziras nek en la naturo nek en Sia popolo unuformecon, sed **unuecon en diverseco**, kiel montras la bildo de korpo kun variaj membroj. Alia taŭga komparo estas la orkestro. Certe estus pli facile ludi muzikaĵon "unisone", sed ĝi estus griza kaj plata. Polifone estas pli malfacile, sed ankaŭ pli riĉigante. Kristano ne devas serĉi ĉe gefratoj nur eĥon de siaj opinioj, sed lerni aŭdi aliajn voĉojn kaj akcepti ilin kiel komplemento de sia propra voĉo.

Iu povus kontraŭdiri : sed la vero estas nur unu ! Jes. Sed Vero ne estas la doktrino de tiu aŭ de alia eklezio, sed Jesuo Kristo (Joh 14:6) kiel la viva Sinjoro de la eklezio. Al li devas obei ni ĉiuj, kiuj ĉiam nur "laŭparte scias" (1 Kor 13:9) kaj ne havas la lastan aŭtoritaton.

La plurecon de eklezioj oni komprenis en la tempo apostola nur kiel la plurecon de lokaj komunumoj en ilia varieco de eklezia vivo, sed en unueco de fido al Dio Patro, Filo kaj Sankta Spirito. En tiu kredo estis baptata ĉiu, kiu ekkredis kaj aliĝis al la Universala Eklezio de Jesuo Kristo (Mat 28:19).

## Komuna kredo de eklezio

La **Eklezio de Kristo** estas sumo de ĉiuj kristanoj kredantaj en Kristo, kiel ĝuste ekkonis John Wycliff. Rajte oni povas nomi ĝin la komuna aŭ katolika eklezio. Tiusence ankaŭ la reformatoroj povis akcepti la esprimon "katolika" en senco ne partikulara sed universala. La komuna Eklezio estas ĉiuj fidelaj kaj per Kristo savitaj kristanoj el ĉiuj epokoj, landoj kaj nacioj, sed ankaŭ el ĉiuj instituciaj eklezioj.

Plej grava por Kristo ne estis la ekstera unueco de organizo, sed la viva komunumo. En Joh 10:16 ne taŭgas la traduko "unu ŝafejo", ĉar la origina esprimo estas POIMNÉ (grego), ne AULÉ (ŝafejo, latine OVILE).

## EVANGELIAJ KAJEROJ

La enhavon de komuna kristana kredo esprimis en la unuaj jarcentoj kvar kredo-konfesoj (simboloj), akceptitaj de la sep unuaj tutkristanaj koncilioj : la *Apostola*, la *Nicea-Konstantinopola*, la *Kalcedona* kaj la *Atanazia* simboloj. Ili proklamas kredon al Dio Patro, Filo kaj Sankta Spirito, al la dia kaj homa naturo de Jesuo Kristo, al la sava signifo de lia krucmorto kaj de lia releviĝo. Konsento en tiuj punktoj estas nepra inter ĉiuj kristanoj.

Vincento de **Lerina** deklaris, ke la komuna kristana kredo estas tio, kio estas "kredata ĉiam, ĉie kaj de ĉiuj" (*quod semper, quod ubique, quod ab omnibus creditum est*). Ankaŭ ni povas tion jesi. Sekve multaj ecoj nek troviĝeblaj en la Biblio kaj en la kvar kunaj kredo-konfesoj, nek akceptataj de granda grupo da (protestantaj) eklezioj, ne povas fari la bazon de unueco : adorado de Maria, de la sanktuloj kaj anĝeloj, la ofico de la Papo kaj la ŝtato eklezia, la meso, multaj ritoj, tradicioj kaj doktrinoj. Kio transpaŝas la kunan bazon, kreas obstaklon al unueco kristana. Homaj aldonoj al la Vorto de Dio ne pliriĉigas, sed malpliriĉigas. Jesuo Kristo eldiris la vorton de Dio en kritika kontraŭo al tradicio :

> «Sed vane ili Min adoras, instruante kiel doktrinojn ordonojn de homoj. Ĉar, forlasinte la ordonon de Dio, vi tenas la tradicion de homoj.» (Mar 7:7-8)

**Divido**

Kontraŭ la volo de Kristo, la Fondinto kaj Sinjoro de la Eklezio, la kristanoj ĉiam pli dividiĝis. La kialoj estis trispecaj :

1. personaj : leviĝo de homaj gvidantoj,
2. doktrinaj : kvereloj pri vero kaj pri ĝusta interpretado de la Sankta Skribo,
3. historiaj : kaŭzitaj per la nacia tradicio, politikaj cirkonstancoj kaj historia evoluo.

Ekestis novaj eklezioj kaj sektoj kaj ĉiu postulis, ke ĝi estas la sola viva popolo de Kristo kaj havanto de la fina vero. Eĉ la universalaj nomoj *kristana* kaj *katolika* fariĝis ekskluzivaj anstataŭ inkluzivaj.

La malnov- kaj mez-epokaj sektoj malaperis unu post la alia (ne la herezioj, ekz-e la ariana, doketisma aŭ donatista, kiuj reaperis denove). En la 11-a jarcento sekvis la divido inter la kristanaj Oriento kaj

Okcidento : la roma papo kaj la ortodoksa patriarko ekskludis unu la alian el la Eklezio.

La plej granda rompo en la kristana historio estis la **Reformacio**. Ĝia intenco ne estis fondi novajn eklezioјn. Kiam la plimulto ne akceptis reformon laŭ la Evangelio, la reformaciistoj starigis veron super unuecon. La reformacio estis tragika neceso. Katolikoj substrekas la vorton "tragika", protestantoj la substantivon "neceso".

Sed kion diri al la ĉiam kreskanta dividado ? Monda kristana enciklopedio en la jaro 1980 nombras 20 780 eklezioјn, inter ili 7889 protestantajn kaj 10 065 sendependajn ! Elstaras Sudafriko kun 3350 denominacioj, Usono 1860, Niĝerio 910, Zairo, Ganao kaj Britio pli ol 50, ktp.[1] Kion fari ?

Falsaj estis pruvoj reunuigi la kristanojn perforte aŭ pere de tielnomata prozelitismo alloganta membrojn de unu eklezio en iun alian sen ŝanĝanta rilato al Jesuo Kristo (vera konvertiĝo estas io alia).

## Kondiĉoj de unueco

Jam la eklezia patro Aurelius **Augustinus** (Aŭgusteno) esprimis la bazan principon de kristana unueco : Pri principoj unueco, pri problemoj libereco, en ĉio amo. Tiun devizon transprenis la malnova *Unuiĝo de fratoj (ĉeĥaj)*. Ĝi akceptis la nomon "unuiĝo", rezervante la vorton "eklezio" al la tuta popolo de Kristo. Ĝi helpis la persekutatajn valdanojn kaj anabaptistojn, havis kontaktojn kun **Luther** kaj kun la kalvinana reformacio, kaj kun la granda utrakvista (husana) eklezio ĝi formulis la kunan ĉeĥan konfesion en 1575.

Nia malgranda lando en la koro de Eŭropo spertis la interkonfesian dialogon jam en la 15-a jarcento. Husanaj teologoj negociis kun reprezentantoj de la Koncilio pri la invito de husanoj al la Koncilio de **Basel**. Dokumento akceptita la 18-an de majo 1432 kaj nomita *La juĝisto de Cheb* (germ. Eger) diras, ke en doktrinaj diferencoj decidu

> «kiel la plej justa kaj senpartia juĝisto la leĝo de Dio, la vivmaniero de Kristo, de la apostoloj kaj de la origina eklezio kune kun tiuj koncilioj kaj instruistoj, kiuj vere fondiĝas sur ĝi.»

Jen direktivo valora ankaŭ por la nuntempa ekumenismo !

EVANGELIAJ KAJEROJ

En Bohemujo sub la husana reĝo **Jiři z Poděbrad** ankaŭ unuafoje ekzistis la egaleco de diverskonfesiaj civitanoj antaŭ la ŝtata leĝo. Al tiu lando sur la krucvojo de kulturaj kaj ekleziaj influoj donis la graco de Dio ŝancon fariĝi taŭga loko por renkontiĝo inter la orienta kaj la okcidenta kristanaro, inter katolikismo kaj protestantismo, inter la unua Reformacio (valdana, husana, frata kaj anabaptista) kaj la dua (luterana kaj kalvinana). Bedaŭrinde la Kontraŭreformacio nuligis tiujn ŝancojn kaj esperojn.

Vero kaj amo

Oni povas paroli pri unueco en vero kaj unueco en amo. La papo Paŭlo la 6-a, eldiris bone, ke se ne eblas ĝis nun la unueco en vero, estas necese celi al unueco en amo. Por la katolika teologio gravas la diferenco inter SAKRIS (sanktaĵoj) kaj SPIRITUALIBUS (spiritaĵoj). Interkonfesia komuneco estas por katolikoj ebla nur en la lastaj. En sakramentoj ne eblas komuneco, eŭkaristio kun nekatolikoj estas malpermesata. Interŝanĝo de predikistoj estas permesata, ĉar la prediko, apartenanta al SPIRITUALIA, ne estas la ĉefa parto en la katolika liturgio.

Ofte ne estas facile trovi balancon inter vero kaj amo. Sekvi la veron de Dio ne postulas malrajtigi fraton aŭ demeti amon al proksimulo. Aliflanke adoro al la Eternulo ne devas esti mallongigita por favoro de homo. Eĉ por amiko ni ne povas forlasi la ekkonatan veron de Kristo.

La pluraleco ne estas malbona, se ĝi ebligas almenaŭ en unu parto de la kristanaro sekvi la puran evangelion kaj uzi la riĉajn spiritajn donacojn, kiujn la Sinjoro donis al la popolo de Dio. Ebla estas komunumo de kredantoj diverskonfesiaj en amo, en toleremo, en la "unueco de la Spirito en la ligilo de paco" (Efe 4:2-3). Ni spertas ĉiam denove tiun ligilon en la konferencoj de kristanaj esperantistoj kaj en la pli larĝa kadro de ekumenaj kaj evangelikaj kunvenoj.

Iu rekomendis tri paŝojn al la kristana unueco :

1. Agnoski la propran kaj la fremdan parton de ŝuldo en la daŭrigata divido.
2. Malkovri por si kaj sia komunumo komprenantan vidon en la pasinteco kaj nuntempo de aliaj eklezioj.
3. Esti preta pli bone ekkoni la aliajn kristanojn, demeti la antaŭjuĝojn kontraŭ ili, kaj malkovri ilian spiritan riĉecon.

## Evangelika Alianco

Pionira formo de interkonfesia kunlaboro estis kunveno de evangelikoj el diversaj eklezioj en la **Evangelika Alianco**, fondita en London en **1846**. Ili ne forlasis siajn ekleziojn, sed kuniris en la fido en Jesuo Kristo, kiel unusola savanto. Ili ne atendis, ĝis la ekleziaj strukturoj ŝanĝos kaj la organizoj unuiĝos, sed kunigis kiel gefratoj en Kristo sub la Vorto de Dio kaj ĉirkaŭ la tablo de la Sinjoro. Ili partoprenas kiel unuopaj kristanoj kaj lokaj eklezioj en alianco, loka, nacia kaj tutmonda.

Nova reviviĝo de la Evangelika Alianco venis en la jaroj 1940. La Alianco disvastiĝis en ĉirkaŭ 60 landoj en ĉiuj kontinentoj.

En la lasta tempo pli forte estas en la evangelikaj rondoj akcentita la graveco de la Eklezio. La Alianco ne volas vivi **sub** eklezio, sed ankaŭ **ne sen** eklezio. La temo de la oka ĝenerala asembleo de la **Tutmonda Evangelika Alianco** (World Evangelical Fellowship, Alliance Evangélique Universelle) en **Singapore** (Singapuro) en 1986 estis "*Revivigu la Eklezion, atingu la mondon*", kaj la temo de la **Eŭropa Evangelika Alianco** en **Bad Homburg** (F.R. Germanujo) en oktobro 1986 "*Disĉiplo en eklezio*". Por oktobro 1989, la Eŭropa Alianco elektis la titolon : "*Renoviĝo de la Eklezio*".

## La vojo de la novtempa ekumenismo

La novtempa ekumenisma movado komenciĝis en 1919 en **Edinburgh** (Edinburgo) tra la **tutmonda misiista konferenco**. La parolo inspirita de D-ro J.R. Mott sonis : "*Evangelizo de la mondo en ĉi tiu generacio*" kun la tasko plantigi la Eklezion en ĉiu nacio². Oni fondis la **Internacian Misiistan Konsilantaron**.

Post la unua mondmilito du novaj movadoj aperis : **Vivo kaj Agado** (Life and work, Christianisme pratique, Vida y Acción) en **Stockholm** en **1925**, kaj **Fido kaj Regulo** (Faith and Order, Foi et Constitution) en **Lausanne** en **1927**. Iniciatinto de ambaŭ estis sveda ĉefepiskopo N. Söderblom. La movadoj kunlaboris kaj aranĝis en 1937 ambaŭ konferecojn en Britujo, sed unuiĝis nur post la dua mondmilito en **Amsterdam** en **1948**. Tiamaniere ekstaris la **Ekumena Konsilantaro de Eklezioj** (World Council of Churches, Conseil cuménique des Eglises), kies sidloko estas Genève. Dum la tria

asembleo de E.K.E. en **New Delhi** (Hindio) en 1961, la Internacia Misiista Konsilantaro kaj la ortodoksaj eklezioj aliĝis al EKE.

Ekde la duono de la jaroj 1960 plifortiĝis en la EKE la koncentriĝo al la sociala aktiveco kiel la plej grava tasko de la kristanaro. Tiu "horizonta" akcento kulminis en la misia konferenco en 1972/1973 en **Bangkok** (sub temo "*Savo de la mondo hodiaŭ*") kaj estis kritikata flanke de la ortodoksanoj kaj eĉ pli forte de la evangelikoj. Sed la menciita tendenco daŭris en la ekumenistaj konferencoj ĝis nun. Mi povis observi ĝin en la monda misia konferenco en **San Antonio** en majo 1989.

Dum tempo kreskis la nombro de membraj eklezioj en EKE, sed ankaŭ la rolo de la regionaj ekumenismaj organizoj same kiel de la konfesiaj ligoj. Disvolviĝas dialogoj inter konfesiaj familioj, duflankaj kaj multflankaj. Depost la **2-a Vatikana Koncilio** ĉiam pli eniras tiujn dialogojn ankaŭ la oficiala Romkatolika eklezio. Ĝis nun ĝi ne decidis estiĝi membro de EKE, certe precipe el dogmaj kaŭzoj : ĝi postulas por si mem pli plenan eklezian valoron kaj dignecon ol por la aliaj.

La plej granda rezulto de tiuj interparoloj estis la dokumento de **Lima** pri ***Bapto, Eŭkaristio, Servado*** (BES), kaj la konferenco de la eŭropaj katolikoj, protestantoj kaj ortodoksanoj "***Justeco, Paco kaj konservado de la kreitaĵo***" en **Basel** en 1989.

**Movado de Lausanne**

En julio 1974 kunvenis en la svisan urbon Lausanne (Laŭzano) 2800 kristanoj sub la alvoko "*Tero, aŭskultu Lian voĉon !*" (Jer 22:29) Ili akceptis la **laŭzanan deklaron** kiel personan deviĝon atesti pri Jesuo Kristo kiel unusola Savanto per vorto kaj vivo. Kun minimuma aparato, la **Komitato de Lausanne** vekas misian fervoron tra la tuta mondo. En la sama tempo, kiam la membraj eklezioj de EKE malkreskis kaj eksonis inter ili la parolo pri moratorio aŭ fino de la misioj kaj pri anstataŭo de misio tra dialogo kun nekristanaj religioj, la nombro de evangelikoj triobliĝis inter 1974 kaj 1989 (de 165 al 500 milionoj). La nombro de evangelizistoj el la tiel nomata Tria Mondo multobliĝis. Miloj el ili partoprenis en grandaj kongresoj en **Amsterdam** en 1983 kaj 1986.

Nova kulmino estis la kongreso **Lausanne II** en **Manila** en julio 1989 kun 4332 partoprenintoj sub la temo "*Proklamu Kriston ĝis li venos*" (laŭ

1 Kor 11:26). La **Manila Manifesto** konkretigas la taskon, en la EKE forgesitan, evangelizi la homaron en ĉi tiu generacio, eĉ antaŭ la jaro 2000. La karakterizaĵoj de tiu kongreso, laŭ mia opinio, estis : 1. aperteco por la sociala servo, 2. por la graveco de eklezioj, laikoj, virinoj kaj junuloj, 3. multeco de kulturoj, 4. malkresko de la tensio rilate al la pentekostanoj kaj ĥarismanoj, 5. konkretaj planoj.

Inter la preparaj konferencoj por **Lausanne II** la plej grava estis la eŭropa en **Stuttgart** en septembro 1988. La temo estis : *Reevangelizo de Eŭropo*".

**Dialogo inter ekumenistoj kaj evangelikoj**

**Tutmonda Evangelika Alianco** kaj la **Komitato de Lausanne** havas la saman teologion "pietisman". Sed gravaj diferencoj ekzistas inter ili ambaŭ unuflanke kaj inter ili kaj EKE aliflanke. Tiuj diferencoj doloras la evangelikoj, kies eklezioj estas membroj en EKE. La **luterana landeklezio de Würtemberg** jam dufoje invitis reprezentulojn de EKE, de la komitato de Lausanne kaj de TEA al kunaj konsultiĝoj. Mi povis partopreni en la lasta en februaro 1989. La teologia malkonsento aperas en la doktrino pri savo, pri eklezio kaj pri la lastaj aferoj (en soteriologio, en ekleziologio kaj en eskatologio).

La nomitaj organizoj invitis observantojn el la aliaj al siaj kongresoj en **Singapore** en 1986, en **San Antonio** kaj **Manila** en 1989. Pli ol 150 partoprenantoj en la misia konferenco en San Antonio sendis leteron al la partoprenantoj en Manila, proponante aranĝi la sekvontan kongreson almenaŭ parte kiel kongreson kunan.

Mi kredas, ke la Sinjoro Jesuo Kristo havas siajn disĉiplojn en ĉiuj eklezioj. Kelkfoje ili estas malobeemaj al sia eklezio por ke ili obeu al Jesuo. Nenia eklezio estas perfekta ; sed ĉia devas kontroli kaj korektigi sin laŭ la Vorto de Dio. Ju pli proksimaj ni estos al Jesuo, des pli proksimaj ni estos unu de alia.

Ni preĝu por la unueco en la senco kaj spirito de nia Sinjoro, eble kun la vortoj de hinda kristanino Sarah **Chakko** :

> «Patro nia, ni petas por la Eklezio, por ke ĝi estu unu en Kristo, la vera komunumo de "nubego de atestantoj" (Heb 12:1) de la fido kun tiuj, kiuj hodiaŭ amas la Sinjoron Jesuon Kriston kaj

servas lin. Estu la eklezioj konsciaj pri sia unueco en Vi, kaj ili proklamu al la malsana mondo Vian sanigantan Vorton. En la nomo de Jesuo Kristo. Amen.»

Cyril Horák, Ĉeĥoslovakio


--------------

**notoj**

1. *Lausanne II in Manila*, LCWE Manila 1989, p. 13.21-13.35.
2. *By the Way*, konferenca ĵurnalo de EKE, n° 3, 25/05/1989, p. 3.

---

Cyril HORáK, ĉeĥoslovako (1930). Li studis teologion en la fakultato de Comenius en Praha (1949-1953), fariĝis doktoro pri teologio en 1984. Pastoro de la Ĉeĥ-frata evangelika eklezio. Membro de la teologia komisiono de la Tutmonda Evangelika Alianco. Edzo kaj patro de 3 infanoj.





Rita Rössler

## PRI LA VORTO "EKUMENISMO"

La Diservoj en niaj kongresoj fariĝas pli kaj pli **"ekumenaj"**, do tial ŝajnas dezirinde ĝuste kompreni la sencon de tiu vorto. Laŭ **PIV**, senco (1) rilatas al la tuta kristana mondo, kaj senco (2) al la unuiĝo de la kristanaj eklezioj. Laŭ Wüster, "ekumena" estas sinonimo de **ĝenerala** kaj **tutmonda**. *Oxford English Dictionnary* (OED) distingas inter (1) la roma kaj greka katolikaj eklezioj antaŭ la Reformacio, kaj (2) la tuta kristanaro poste.

D-ro L. L. Zamenhof estis la unua kiu vastigis la sencon de "ekumena" proponante la formadon de tia religio kiun li baptis Homaranismo, al kiu li invitis ankaŭ judojn kaj mahometanojn. «Kristanoj, judoj, kaj mahometanoj, ni ĉiuj de Di' estas filoj» li kriis en sia *Preĝo sub la verda standardo* kies lasta strofo estis kaŝita dum multaj jaroj de malkuraĝaj hipokrituloj. Ekumena Diservo en tia senco (sed sen mencio de Zamenhof aŭ de Esperanto) okazis antaŭ ĉ. dek jaroj en la tiam nova anglikana katedralo de Wellington kun la partopreno de anglikana episkopo kaj de la ambasadoroj de Israelo kaj de Egiptio. Eĉ pli vasta senco de "ekumena" estas nun akceptata de Tutmonda Ekumena Ligo, kiu publikigas la trimonatan organon *Ekumenismo*, kun eldonejo ĉe Piazza Duomo 4, I-48100 Ravenna, Italio, jarabono US$ 10. La numero 11 (1988) estas plenigita de artikolo de redaktorino Maria Thenguvila, kiu devenas el Hindio kie ŝi faris klasikajn studojn kaj de kie ŝi translokiĝis al Eŭropo antaŭ ok jaroj, sin dediĉante al ekumenismo en la vasta senco. Verkita en ankoraŭ primitiva Esperanto (kiu espereble pliboniĝos), la artikolo de mia dokta kolegino invitas la anojn de Hinduismo kaj Budhismo, tiuj grandaj religioj, al ekumena agado. Mi nur notas du diskutindajn problemojn : (A) Ĉu la invito estas rezervata al monoteistoj, kaj (B) Ĉu vere ateistoj estas ankaŭ invitataj kiel aperas en la teksto. Se politeistoj kaj ateistoj estas invitataj, tiam la sfero de "ekumena" fariĝas tiom vasta, ke ĝi estos apenaŭ senchava por la plej multaj homoj. Kun scivolemo mi atendas la respondon.

J. Major
el *Nov-Zelanda esperantisto*,
488 (1989.08), p.2



## NENIU VIDIS DION : EKLEZIA DIVERSECO ESTAS DO NECESA

### l' O ĉie

Unu el la bazaj diferencoj inter la klasika mediteranea kulturo kaj la nuna eŭrop-usona kulturo estas laŭ mia kompreno, ke la tuta vivmedio de la homoj plej fundamente ŝanĝiĝis. Por helenoj de kiu ajn POLIS, por la diversaj popoloj de Italio, oskoj, umbroj, latinoj, etruskoj, sabinoj, keltoj, ktp., por la loĝantoj de Gaŭlio, por ĝermanoj ktp. ktp., por ĉiuj tiuj, same kiel por la popoloj orientaj, siroj, egiptoj, mezopotamianoj, ktp., la tuta vivmedio, la tuta reala ĉirkaŭo de la homa ekzistado estis envolvita, portata, ŝirmata kaj minacata de amasego da manifestacioj de "l' O dia". La latina lingvo havas por tio tre sendifinan vorton : NUMEN. Ĉie kaj ĉiam ĝi ĉeestis, senkonsidere ĉu oni atentus aŭ ne. Dia aŭ demona aŭ spirita "O" onin akompanis tra la tuta vivo. Ĉu oni manĝis aŭ trinkis, faris tiel simple homajn agojn kiel fekado aŭ sinbano, ĉu oni profesie aŭ aliakaŭze plenumis certan agon, segi aŭ marteli, semi aŭ rikolti, akvumi aŭ pentri, en jurproceso ataki iun aŭ sindefendi, ĉe ĉio ajn oni sin sentis kaj sciis ĉirkaŭata (ade kaj daŭre !) de l' "O" de la transa mondo. Kaj el tio devenis multege da oferaĵoj laŭdeve plenumendaj, devenis sorĉadpraktikoj kaj divenadoj por ekscii, kiom eble anticipe, ĉu la "O" granda estus ĉifoje minaca aŭ bonvola. Fakte la tuta ekzistado vivis en daŭra konscio, ke neniam kaj neniel oni estas sola. Homo nur ĉe si mem. Daŭre obsedata, daŭre observata, daŭre prijuĝata, kaj sekve : daŭre devigita sin defendi, sin ŝirmi, sin protekti.

### Liberigo ?

La helena kulturo jam ekde **Homêros** montras tutan vicon da rezistoprovoj kontraŭ ĉi tiu *antaŭ-klasika* sinteno. Iel jam **Homêros** (por en tiu nomo resumi ambaŭ grandiozajn poemojn) estas raciigo de la tuta mondo, iel jam **Homêros** estas fuĝo for el la minacata ekzistado : la dioj tie fariĝis stiligitaj, raciigitaj, malpli demone nekapteblaj. Sed la fona kaj praa baza religieco pludaŭris tra la jarcentoj, certe en malpli kulturitaj

---

NATURO DE DIO, INTERLIGO, UNUECO DE LA EKLEZIO • NATURE DE DIEU, ALLIANCE, UNITé DE L'éGLISE • GOD'S NATURE, COVENANT, CHURCH UNITY • DAS WESEN GOTTES, BUND, EINHEIT DER KIRCHE • NATURALEZA DE DIOS, ALIANZA, UNIDAD DE LA IGLESIA • NATURE DI DIO, ALLEANZA, UNITà DELLA CHIESA.

tavoloj. La filozofoj malvolvis certan agnostikismon kaj eĉ certan indiferentecon rilate la "O"-n dian, kelkaj filozofoj eĉ rekte ekneis la ekziston de dioj. Iom malfrua eĥo troviĝas ĉe la latina **Lucretius** (Lukrecio), kiu baziĝante sur helena filozofio, ĉefe sur **Epikouros** (Epikuro), provas liberigi la homaron el ties traŭmatiga di-kredo.

Kaj JHVH ?

La mondo de la Biblio, kiu mem kovras pli ol jarmilan evoluon, estas ege bunta ankaŭ en rilato al la maniero, kiel oni konceptis pri Dio. Postrestas tekstoj, atestantaj ke iam ankaŭ ĉe la hebrea popolo estis kutime pensi pri tuta amaso da manifestiĝoj de l' "O" dia : ekz-e en psalmo kiam estas dirite, ke "**JHVH** ekstaris meze de kunveno de la dioj". Ankaŭ la priskriboj pri **JHVH** mem foje retenas ankoraŭ trajtojn el la praa demoneca kompreno pri la transa mondo (vidu, kiel **JHVH** minacas Moseon, tuj antaŭ cirkumcidiĝo). Ankaŭ en la hebrea sinkompreno kaj ilia vivpercepto enestis origine la obsediĝo pri la minaca ĉiea apudeco de l' "O" dia, de tie devenas certe la multegaj preskriboj kaj ritoj plenumendaj ĉe naskiĝo, ĉe menstruo, ĉe rikolto, ktp. Nepre multrilate parence al la ĉirkaŭa mondo.

**La Interligo**

Sed la profeta linio en la evoluo de la hebrea religio kreis koncepton pri Dio, kiu estas tute alia. Dio fariĝis la **ne**-kaptebla, la **ne**-tuj-ĉea, la **ne**-videbla. En la Torao, kiu post multaj redaktistaj laboroj atingis en plurcentjara procedo sian nunan formon, oni trovas la koncepton, ke Dio **JHVH** havas **Interligon** kun Sia Popolo. Sed, vi bv. bone atentu : ĉe atenta rigardo malkovriĝas du konceptoj pri la "O" dia malantaŭ la tekstoj. La unua formo de **Interligo** havas kiel ekzemplon la t.n. vasal-kontrakton : vasalaj regantoj kutimis fari **interligon** kun sia plisupera reĝo, por sub ties protekto plu ordoni sian propran teritorion. La vasalo obeis je certaj postuloj de la pli supera reĝo ; la alia lasis lin en paco, kondiĉe ke li ricevu je certaj momentoj difinitan kvanton da enspezoj kaj profitoj, ekz-e milita subteno. Ankaŭ la unua koncepto pri la rilatoj inter Dio **JHVH** kaj la hebrea popolo baziĝas sur tia kontrakto. Dio difinas la kondiĉojn, la popolo akceptas ilin kaj promesas plenumi ilin. La homo ne povas vivi en rekta kontakto kun Dio, sed obeo al la paroloj de Dio sekurigas la vivon de la homo (Eli 24:4-10, krome en Eli 19:34 kaj aliloke). Finas la interligon la tiam kutima apudmeto de «beno»

kaj «malbeno» : okaze de obeo la granda reĝo (ĉifoje **JHVH**) benos la vasalon (la popolon), okaze de malobeo la reĝo punos la vasalon per morto (klara ekzemplo de tia interligo estas Josuo 24).

La hebrea popolo ekhavis la eblon alfronti Dion kiel personon, dank'al tiu ĉi "jura" vortigo de la rilatoj. Per ĝi Izrael distingiĝis disde la religia konceptaro de l' ĉirkaŭaj popoloj, por kiuj la "O" dia estis nelozigeble interplektita kun la tuta kosma realaĵaro. Dio fariĝis por Izrael tute memstara ento, kontraŭ la universo kreita ; Dio fariĝis Tiu, kiu estante persono, povas esti kontraktita.

Sed, jam la teksto de Josuo 24 montras heziteton : "Ĉu vi kapablos obei la Sinjoron, ĉar Li estas sankta..." Tiu ĉi frazeto jam iel indikas enkreitan fiaskon de la unua modelo de interligo : la homoj ne kapablos plenumi cent-procente la kondiĉojn. Kaj, se tiel okazos, ĉu Dio **JHVH** montriĝos same despota kiel la granda reĝo, kies kontraktojn kun vasaloj oni prenis por ekzemplo ?

**Amo**

Readmono donas duan version de la Leĝodono de Sinaj. Sed estas multe pli ol simpla ripeto de Eliro. La koncepto **Interligo** ŝanĝiĝas : tre parence al Jer 30;31 legiĝas en Read 30:11-14 ke ĉi ordono estas ne ie fore, sed "en via buŝo, en via koro" por ke vi povu ĝin fari. Readmono substrekas ke la Interligo neniel dependas de homa merito (tion oni ja povus subkompreni el la teksto de Eliro ; ĉar laŭ tiu teksto aŭ la homoj obeus kaj sekve *meritus* sian bonfarton aŭ ili ne plenumus la interligon kaj ties kondiĉojn kaj tiam ili *meritus* kondamniĝon. Sed kiel dirite, oni konstatis jam ke estas granda hezito, ĉu tion homoj kapablos). Read 9:4 ja jam diras : ne diru ĉe vi mem : pro mia justeco la Sinjoro ekprenis tiun ĉi landon por mi... Kiel homo oni ne fieru antaŭ Dio pri sia merito.

Sed : tio subfosas la koncepton de Interligo kiel kontrakto, ĉar tio ja dependas de ambaŭ flankoj : *ambaŭ* devas obei kaj plenumi la interkonsentitajn kondiĉojn.

Fakte en Readmono la Interligo-ideo transformiĝas de la origina ambaŭflanka plenumenda kontrakto al situacio kie **amanta** Dio (kies amon pruvis historiaj okazaĵoj, kiel savo de fremduloj kaj vidvinoj el Egiptio : Read 10:14-18, ktp.) kun bonvolo donas la vivon kaj bonfarton

al sia popolo **amata**. Ne eblas en mallonga artikoleto plene dismeti tion ĉi ; tial mallonge mi iom indikis la ĉefajn trajtojn.

**La universo**

Do, por iom provi resumi : en la tuta ĉirkaŭmondo tiuepoka oni kredis, oni estis konvinkita, ke ĉiam kaj ade ĉirkaŭas, apudas kaj kvazaŭ spionas la "O" dia. Tion oni devis daŭre provi pacigi por ke oni povu plu vivi sen grandaj katastrofoj. En Izrael oni faris principan distingon inter Dio kaj la universo : Dio estas persono memstara de la universo kreita de Li. Do onin **ne** ĉiupaŝe ĉirkaŭis tuj nevideblaj sed tuŝpalpeblaj diaĵoj minacaj favoraj benaj mortigaj, kapricaj... Dio estis disigita de la ĉimonda palpebla realo : la popolo havis certan kontrakton kun Li : la popolo devis plenumi Liajn kondiĉojn kaj tiam ĝi vivos bone kaj sane kaj feliĉe. Sed : montriĝas ke la homoj ne kapablas plenumi tion ; sekve venis nova koncepto de l' interligiteco : Dio pro amo, en sia bonvolo, donacas la vivon al sia popolo.

La profeta linio substrekas, kaj ankaŭ en la Torao eniĝis tiu koncepto plurloke, ke Dio estas ne de nia universo : ke Dio estas **nepalpebla, nevidebla, ne-nia-mondeca.** Moseo Lin volas vidi, kaj aŭdas nur Liajn Parolojn (Eli 33:18 ks;34:5-7).

**Jesuo**

Kaj siatempe Jesuo staris sur tiu profeta linio, dirante en Joh 1:18 ke **Neniu vidis Dion** ; la unika filo, kiu estas plej intima al ("kuŝas ĉe sino de") la Patro, tiu igis Lin konata. **Jesuo konigas Dion.** Lia tuta vivo estis, kiel ĝin nomas **Schillebeeckx** tre prave "parabolo de Dio". En sia tuta vivovojo Jesuo montris, kia estas Dio. Sed "neniu propraokule **vidas** Dion", en fizika senco, same kiel kunhomon aŭ arbon aŭ la lumon ni vidi povas. Dio estas kaj restas tute laŭprincipe "ne de nia universo."

**Kristana unueco ?**

Multaj homoj de jarcentoj revadis pri unueco inter la kristanoj. En tio ili trovis certan subtenon en la preĝo kiun Johano metas al Jesuo en la buŝon "Ke ĉiuj estu unu..." Ĉar, se esti realismaj : la historio montras sufiĉe klare, ke neniam kristanismo estis unueca. Ne nun, ne en la Mezepoko, ne ĉe sia ekesto : Paŭlo jam grumblas pro la proverbeca

partiemeco inter la kristanoj (1 Kor 1:12 : eklezio de Paŭlo, eklezio de Apolos, eklezio de Kefas, ...). Legu ankaŭ mian *La Evangelio laŭ Maria Magdalena*, kie tiun ĉi temon mi traktas pli detale.

Se oni revas pri returniĝo al tiu praa unueco de ĉiuj kristanoj, ho estu atentaj ! Oftege oni ja kaŝe revas pri unuecigo de ĉiuj sub unu sola sistemo, sub unu sola dogmaro, sub unu sola organiz-principo. Kaj kompreneble ja sub la sia, ne sub la via ! Revoj pri kristana unueco ofte estas revoj pri regado super ĉiuj kristanoj. Sed laŭ Jesuo la eklezio estas komunumo de la geamikoj «mi ne plu nomas vin sklavoj, sed amikoj», kaj inter amikoj ja ne ekzistas regado !

Alia flanko estas la terure aĉa realo, ke oftege kristanoj diverseklezia inter si batalas, ke unuj kondamnas aliajn, ke unuj opinias la aliajn neindaj, forigendaj, ekstermendaj eĉ... Kaj kion pensi pri la stulteco, ke pasintjarcente (kaj ĉu eble eĉ ankoraŭ nun foje ?) misiistoj kristanaj de malsama eklezia deveno ie en triamonda teritorio sin renkontis, ĉiuj kun la celado "kristanigi ĉiujn popolojn", sed samtempe plej akre atakante unuj la aliajn... Ho kiel kredinda estas tia kristanismo ! Ke el ĝuste tiaj konfrontiĝoj estiĝis la tutmonda ekumena movado, miatakse estas nur granda bono. Fakte estas la sole ebla sekvo kiu estus senchava.

## Neniam

Sed restas la alia flanko, kiun komence mi menciis : kristanismo neniam estis plene unueca, laŭ dogmoj, laŭ kredkonfesoj, laŭ eklezia strukturo (kun unukapa estrado, kun grupgvidado, kun nur vira superregado, kun egaleco inter viroj kaj virinoj, kun etoso tute pie piisma, enfermiĝema en sian propran kredon, aŭ ĝuste kun etoso de "spriritualeco por batalo" kontraŭ diskriminacioj kaj maljusteco, ktp. ktp.) : kristanismo neniam estis unueca ĉiurilate, eĉ ne en okcidenteŭropa Mezepoko, kvankam tie kaj tiam oni pleje alproksimiĝis al tiu idealo : "Unu Imperio kaj unu Imperiestro kaj unu Papo", sed eĉ tiam ĉiam ekzistis ie tie grupetoj kristanaj kiuj ne estis asimileblaj al la granda unueca kaĉo kristana.

## Ĉu bone ?

Kaj por esti plene honesta : mi ne vidas malbonon en tio. Absolute ne. Estas bone, ke ekzistas tiom da diversaj malsametosaj kaj malsamtendencaj

grupoj kaj eklezioj kristanaj. La homoj ja ankaŭ ne estas ĉiuj unuece samaj : ne por ĉiu taŭgas daŭra aŭ eĉ ofta meditado, nek por ĉiu taŭgas neniam meditadi. Ne por ĉiu homo religio estas intime vivapuda, tiel ke li/ŝi aŭtomate el sia kredo, el sia Di-fido ekbatalas kontraŭ nukleaj armiloj kaj atomenergio kaj rasapartigo, ktp. Ne ĉiu sentas la saman intiman varmon en sia koro, kantante kune kun samkredantoj. Mi kredas sincere ke estas bone, ke daŭre ekzistu unuj apud la aliaj eklezioj kaj lokaj komunumoj kristanaj de plej diversaj etosoj kaj akcentoj kaj koloroj. Se jam nur, por ke **senescepte ĉiu homo** kiu emas fariĝi kristano kapablu trovi eklezion kie sin senti hejme.

**SED** ege grava antaŭkondiĉo, por ke tio okazu en senchava kaj inda maniero, estas miakomprene, ke ĉiu kristano klopodu por plene respekti ĉiun alian homon, kiu nomas sin kristano. Ke neniu eklezio kontraŭbatalu alian eklezion. Ke neniu dogma sistemo (do ankaŭ ne mia sendogma sistemo) arogu al si, ke nur ĝi estas senchava.

Kiel foje diris unu kolego mia, pli malnova (preskaŭ samaĝa) pastoro al mi : la Biblio estas tiel bunta, ke ne eblas resumi ĝin sen perdi valorajn detalojn ; Dio estas tiel granda ke nenio homa Lin povas ĉirkaŭi ; la Evangelio estas tiel riĉa ke neniu eklezio ĝin komplete povas vivi. Do estas bone, ke ekzistas ili unuj apud la aliaj...

Tute principe : la ne-videblan ĉiu kristano (fakte ĉiu homo !) adoru laŭ la plej funda konvinko ; tial estas bone ke la malsamaj eklezioj liveras multajn diferencajn manierojn por partopreni tiun adoron.

Gerrit Berveling, Nederlando

---

Gerrit BERVELING (*ĥerit*), nederlandano (1944), fakulo pri klasika filologio latina kaj helena, teologo, esperantisto depost 1972, pastoro en la Remonstranta Eklezio, kunlaboras en diversaj revuoj, eldonas la serion *Voĉoj Kristanaj*.

## KUNLABORO PERE DE LA BIBLIO

> «Salutu Trifajnan kaj Trifosan, kiuj laboras en la Sinjoro. Salutu Persison, la virinon amatan, kiu multe laboris en la Sinjoro.» (Rom 16:12)
> «Ni estas kunlaborantoj kun Dio.» (1 Kor 3:9)

Evidente Dio volas ke ni laboru kun li, kaj unu kun la alia. Sed, laŭ 2 Johano 10, estas kelkaj, kiujn ni devus ne ricevi en la somon, kaj al kiuj ni devus ne doni saluton. Kiaj estas la limoj de kunlaboro ? Tiuj, pri kiuj Johano skribis, ne restis "en la instruado de Kristo." Por ni, tio, kion ni scias pri la instruo de Kristo, troviĝas en la Biblio. Do, jen la bazo kaj la limo de nia kunlaboro.

Se katolikoj kaj protestantoj deziros solvi problemojn pri kunlaboro, oni ne povos citi la Koncilion de Trento aŭ la Unuan Vatikanan Koncilion, kun la espero ke la protestantoj tuj jesos. Simile oni ne povos esperi ke katolikoj tuj akceptos la Kredokonfeson de Westminster, nek la Tridek-naŭ Artikolojn de la Anglikana Eklezio, nek la verkojn de Calvin aŭ Luther, ĉar ofte ili opinios ke tiuj dokumentoj enhavas seriozajn erarojn.

En ĉiu konfesio oni nuntempe alte taksas la vortojn de la Biblio, kaj preskaŭ malaperis la malfacilaĵoj, kiujn oni antaŭe spertis, kiam multe da katolikoj akceptis nur tradukojn el la latina, kaj protestantoj plejofte uzis tradukojn el la greka kaj la hebrea.Mi klare memoras ke antaŭ pli ol kvindek jaroj belga junulino malakceptis francan novan testamenton dirante : "Oni malpermesas al ni legi la Biblion." Nuntempe oni ne nur permesas, sed instigas la legadon de la Biblio.

En Anglio antaŭ kvindek jaroj protestantoj uzis la tiel nomatan *Authorised Version*, dum katolikoj uzis la version de *Douai/Rheims*. La rezulto estis ke kelkfoje disputoj okazis, ekz-e pri la vorto REPENTANCE (pento) ĉar en la alia traduko aperis PENANCE (pentpuno). Feliĉe preskaŭ ĉie oni nun trovas modernajn tradukojn, en kiu tiaj problemoj ne okazas.

---

**BIBLIO, INTEREKLEZIA KUNLABORO** · BIBLE, COLLABORATION ENTRE EGLISES · BIBLE, INTER-CHURCH COLLABORATION · BIBEL, ZWISCHENKIRCHLICHE ZUSAMMENARBEIT · BIBLIA, COLABORACIóN ENTRE IGLESIAS · BIBBIA, COLLABORAZIONE TRA CHIESE.

En Esperantujo ni feliĉe havas nur unu uzeblan tradukon, kaj por ordinaraj celoj ĝi estas tute fidinda. La rezulto estas ke, kiam **IKUE** kaj **KELI** kune kongresas, oni povas aranĝi multe da diskutoj sen disputoj, ĉar ĉiuj citas la samajn tekstojn !

Ni havas malsamajn tradiciojn, kaj tio estas plej evidenta kiam ni volas kune veni al la tablo de la Sinjoro. En Britio la episkopoj malpermesas ke katolikoj kaj ne katolikoj uzu samtempe la saman tablon, sed permesas ke oni starigu du tablojn, kaj uzu ilin samtempe. Tion ni faris ĉi-jare, kaj en **Annan Court**, kaj en **Brighton**. Sed ĉu ĉiu ĉeestanto povis uzi la samajn vortojn ?

Ni trovis ke la romkatolika kaj la anglikana liturgioj uzas multe da frazoj ĉerpitaj el la Biblio. Kiam ambaŭ uzis la samajn vortojn ne estis problemo. Kiam ili malsamis sed la diferenco ne estis grava ni sekvis la romkatolikan uzon. Kiam ĝi estis grava oni devis elekti inter la du, aŭ prefere uzi vortojn el la Sankta Biblio, kiujn ĉiuj povis akcepti. Eble homoj de bona volo, kun la necesaj spertoj, povos plibonigi la tekstojn kiun ni uzis, sed ni ĝojegis ke ni povis kune manĝi kaj trinki, kaj kune danki la Savanton, kiu mortis por repacigi nin, kaj nun vivas kiel nia komuna ĉefpastro.

Dum la ĉijara Ekumena Kongreso, la vic-prezidanto de KELI montris ke inter KELI-anoj estas multe da malsamaj konfesioj. Kelkaj IKUE-anoj respondis ke ankaŭ en la romkatolika eklezio estas pluraj tendencoj. Kio allogis nin, ke ni deziris pasigi unu semajnon kune ? Ne estis nur ke ni volis renkonti homojn el diversaj landoj, aŭ ke ni volis uzi la internacian lingvon. Ni kunvenis ĉar ni estas parto de la familio de Dio. Li Sin revelaciis per la profetoj, kaj en Sia Filo. Pri ambaŭ ni povis legi en la Biblio, kaj tiel ni povis senpere ĉerpi el la fundamento de la fido, kaj decidi kiel agi je la fino de la dudeka jarcento.

En multe da landoj ekzistas komunumoj, ne ligitaj al iu ajn konfesio sed vere kristanaj. La **Esperanto-Diservo Londona** estas tia. Ni bonvenigas ne nur anglikanojn, sed ankaŭ baptistojn, metodistojn, savarmeanojn, reformitojn, ortodoksanojn, romkatolikojn kaj kristanojn, kiuj ne apartenas al iu ajn el tiuj ĉi grupoj. Estas nia celo ke ĉiuj, kiuj gvidas la Diservojn, elektu temojn kaj himnojn konforme al la Biblio.

Simile en Pekino eksterlandanoj, kiuj deziris ĉeesti Diservon uzante la

anglan lingvon, kunvenis el ĉiu kontinento kaj el preskaŭ ĉiu konfesio. Mia plej juna filo elektiĝis prezidanto de la tiel nomata kultkomitato. Ĉiam oni kantis, preĝis, aŭskultis la legadon de la Biblio kaj mesaĝon bazitan sur ĝi. La kunuleco estis notinda, kaj kelkaj kiuj antaŭe ne interesiĝis pri la kristana religio, fariĝis kristanoj. Kiam tiu komunumo antaŭe sciis ke ĉeestos pastro aŭ pastoro, ili povis ankaŭ ĝoje ricevi komunion.

En multe da lokoj, sendependaj aŭ memstaraj eklezioj troviĝas. Ekzistas en Britio **Federacio de Sendependaj Evangelikaj Eklezioj** (F.I.E.C.). Ekzistas ankaŭ baptistaj eklezioj, kiuj ne estas membroj de la Baptista Unuiĝo. Ekzistas asembleoj de fratoj, kelkfoje strikte ligitaj unu al aliaj, kelkfoje vere memstaraj, kvankam ili invitas predikantojn kj bonvenigas kristanojn el aliaj eklezioj. Ili tiel evitas la akuzon, ke ili estas sektemaj.

Tiaj eklezioj devas havi sekuran fundamenton. Ofte ili esprimas ĝin kiel "lojaleco al Kristo, kaj obeemo al la Sanktaj Skriboj." Ili uzas la Novan kaj la Malnovan Testamentojn, kaj ofte troviĝas inter tiaj eklezioj homoj, kiuj tre bone scias la enhavon de ambaŭ. Ili povas decidi laŭ lokaj cirkonstancoj kiel apliki la instrukciojn, kiujn ili trovas en la Nova Testamento. Kelkfoje du najbaraj eklezioj interpretas malsimile la eldirojn de Paŭlo, ekz-e pri la oficoj, kiujn virinoj rajtas plenumi, sed tio ankaŭ okazas en "grandaj denominacioj !"

Al la miloj, kiuj antaŭen venis kiam Billy **Graham** predikis en London en 1989, li diradis : "Legu la Biblion, aliĝu al eklezio, kaj atestu pri tio, kion Kristo faris por vi." Al tiuj, kiuj ankoraŭ ne estis ligitaj al iu ajn eklezio, li diris : "Trovu eklezion kie oni predikas el la Biblio." Tion ankaŭ diris la gvidantoj de la lokaj inter-ekleziaj grupoj, kiuj stariĝis por helpi tiajn homojn.

Do se temas pri elekto inter eklezioj, kunlaboro en la eklezio, aŭ kunlaboro inter eklezioj aŭ konfesioj, la Biblio ludas gravegan rolon. Dio donis al ni Sian Vorton, ni devas diligente atenti ĝin.

David Featherstone, Britio

EVANGELIAJ KAJEROJ

David FEATHERSTONE (*dejvid feθestoŭn*), brito, kiu jam verkis por *Evangeliaj Kajeroj*. Dum dek tri jaroj li preparis studentojn por instrui pri religiaj aferoj en britaj lernejoj. Li estas presbitero en sia evangelika komunumo.

## EVANGELIAJ KAJEROJ

n-ro 7 : *Paco, Justeco*

**Farkas É.** : Paco en nia tempo (el Annan Court)

**Hayward P.** : Homa Justeco (el Annan Court)

**Kóbor L.** : Dia justeco (el Annan Court)

**Gishron J.** : Paco kaj justeco sur la tero de la fidoj

**Tuinder J.** : La Regno de Dio kaj Lia justeco

**Rotthaus T.** : Al malriĉuloj Evangelio estas predikata

**Cadei B.** : Assissi : paco inter la religioj ?

## PER LA GLAVO AMBAŬTRANĈA

Kiel utila instrumento estas la bona teorio ! Ĝi helpas la vivon kiam ĝi klare dispartigas la veron de la malvero.

Ni, kristanoj, posedas vere perfektan teorion en la Biblio. Ĉi tie ni havas klarajn nociojn, logike konsekvencajn, tute sufiĉajn por la praktika uzado. Per ĝi ni povas ĉiam apartigi la principojn de duarangaĵoj, la veron de la falso, la kristanojn de la nekristanoj. Kiel per ambaŭtranĉa glavo. Neniu povas stari en la mezo, ĉu ne ? Estas nur du partoj kaj vi nepre okupos la unuan kaj lasos la alian. Ekzemple, laŭ la preskribo de la apostolo Paŭlo ni rajtas unuiĝi nur kun kredantoj-kristanoj. Tamen, kiu estas kristano ? Kiel diferencigi la veran kristanon de la falsa ? Vere ne simpla afero en la nuna situacio de diversaj eklezioj, komunumoj, grupoj, liberaj kristanoj.

Ni prenu, tamen, la ambaŭtranĉan glavon, nian kristanan teorion. El la Biblia teksto ni povas ekstrakti kompleton de bazaj kristanaj veroj. Mi estas konvinkita, ke tia kompleto estas unika. Ĉi tio signifas ke du aŭ pli ol du sendependaj esploristoj venos al la samaj kristanaj principoj, se ili laboras honeste kaj profesie. Jam posedantaj la principojn menciitajn ni povas senerare kvalifiki unu homon kiel kristanon aŭ nekristanon. Per la glavo ambaŭtranĉa.

Ni ege bezonas fari ĉi tiun laboron en KELI kaj en la tuta kristanaro. Tiamaniere ni liberigos la vojon al unuiĝo vera, solida, principa, ne simple meĥanika. Se vi aŭ aliaj kristanoj ne konsentas, mi petas, ekspozu klare kion vi kontestas aŭ kion vi aldonus kaj bonvolu proponi vian ekstraktaĵon de bazaj kristanaj veroj. Kaj per tia kompleto ni povus, kiel per unu ambaŭtranĉa glavo, senerare diferencigi la verajn kristanojn kun kiuj ni rajtas unuiĝi. Tio estas tre grava afero en la ekumena movado.

Do mi petas, ne timu meti la problemojn akute. Mia artikolo estas sala, sed salo estas bona aĵo, ĉu ne ? *Dia Regno* povus aldoni solidan impulson al la ekumena movado, mi esperas.

---

EKUMENISMO, VERO · OECUMÉNISME, VÉRITÉ · ECUMENISM, TRUTH · ÖKUMENISMUS, WAHRHEIT · ECUMENISMO, VERDAD · ECUMENISMO, VERITÀ.

Do, ni kolektu la diverseklеziajn kompletojn de kristanaj principoj. Ni organizu grupojn de specialistoj kiuj komparos ĉi tiujn kolektaĵojn kun la bazaj kristanaj veroj de la Biblio. Tiam ni klare vidos kiu estas kristano kaj kun kiu ni rajtas unuiĝi. La Sankta Spirito gvidu nin.

Cvetan Sirmanov, Bulgario

**Rimarkoj de la redaktoro de *Dia Regno***

Al nia frato Cvetan Sirmanov mi skribis pri la praveco en lia artikolo pri la trovado de la vero, sed ke la trovitaĵo validas unualoke por la trovinto. Oni ne uzu ĝin por juĝi aliajn homojn.

Dum mia vivo oni jam akrigis tiom da ambaŭtranĉaj glavoj, ke mi dubas ĉu eblas senerare diferencigi. Fine estas Dio kiu juĝas pri la koro. Memoru nur la parabolon en Mateo 25:31-46. "Ni scias nur laŭparte" skribis Paŭlo.

Jan van Keulen, Nederlando

**El la respondo de C. Sirmanov**

Tamen mi konsideras la kritikon malekzakta. Nenie en mia artikolo mi juĝas aliajn homojn. Mi proponas : la Vorto de Dio mem juĝu ! La Sinjoro Jesuo Kristo diris, ke la vorto, kiun li parolis, juĝos nin, homojn. Kaj ni havas la Dian Vorton klare, unike ekzpozita en la Biblio. Estas nur unu kompleto de bazaj kristanaj veroj, skribitaj en la Biblio. Ne estas relativismo, dusenco aŭ multsenco en la Biblio. Estas diversaj opinioj, sed la vera, Dia kompleto de bazaj veroj estas unu kompleto. Pri tio temas. Mi proponis mian ekstrakton de bazaj kristanaj veroj.

el *Dia Regno*, julio 1989

**Respondoj**

La projekto de nia frato Cvetan Sirmanov celas kredokonfeson. Kelkaj kredokonfesoj, per kiuj oni juĝis ĉu iu estis kristano, konatiĝis. Teologoj ankaŭ supozas, ke 1 Tim 3:16 servis laŭ la deziro de Cvetan Sirmanov. Tamen ĉiu kredokonfeso interpretiĝis diverse, kelkfoje tre libere. Ŝajnas al mi, ke la plej klara respondo, ĉu iu estas kristano,

estas donata de Kristo mem per Joh 14:23.

T. W. Teich, F.R. Germanio

Alte estimata redaktoro !

Kun interesego mi eklegis la artikolon *Per la glavo ambaŭtranĉa* (*Dia Regno*, 1989/VII/p.42) verkita de S-ro **Sirmanov**. Elleginte ĝin, mi tamen sentas min iom malcerta kaj ne tute konvikita. Mi plene konsentas kun via teniĝo esprimita en viaj *redaktora invito* kaj *rimarko de redaktoro*. La precipa celo de s-ro Sirmanov estas certe grava.

Jen miaj rimarkigetoj :

Unue. La vivo de ĉiu homo estas multaspekta. Mi ne estas agnostikulo aŭ ano de relativismo. Vero ekzistas. Problemo estas nur ĝuste rekoni ĝin. La komprenokapabloj de la homo estas ne sen iuj limoj kaj dependas de pluraj faktoroj (I. Kant kaj "ni scias nur laŭparte ..." (Paŭlo)).

Due. Same necesa kiom bona teorio estas bona praktikado. Kelkafoje oni kapablas ekkoni la veron nur pro la realaj "fruktoj" (Mat 7:20). Kaj "ortodoksio" kaj "ortopraksio".

Trie. Faru eksperimenteton. Petu anojn kun diversa religia vivhistorio el komunumoj kun malsama eklezia tradiciaro, ke ili surpaperigu sian propran kompleton de bazaj kristanaj veroj sur la bazo de la Biblio. Verŝajne estos konsiderindaj diferencoj inter ĉiuj. Parton el tio ĉi oni povas facile rimarki en la diversaj oficialaj kredokonfesoj de la eklezioj. Fakte ankaŭ evangelikoj havas por gvido tiajn fundamentajn kredokonceptojn, kvankam iuj eble emas malestimi la oficialajn kredokonfesojn de la eklezioj. Cetere, mi ne kuraĝus aserti ke iuj el ili ne estus laborintaj honeste kaj profesie, ĉar dogmaj malsamaĵoj montriĝis. Spite al tiuj dogmaj diferencoj, multaj tute same opinias en etikaj demandoj, kunlaborante en la ĉiutaga vivo. Krome, diferencoj en la vortigo ne ĉiam devas indiki diferencojn inter la spirita konceptoj. Kelkafoje nur la "lingvo" malsamas. Aliaflanke, kelkafoje laŭlitere samaj vortoj ricevas malsamajn interpretaĵojn.

Kvare. Multego dependas de la maniero kiel oni rilatas praktike kaj science al la Biblio. Personoj, kiuj emas interpreti bibliajn tekstojn

laŭ pietismaj aŭ kvietismaj pensmanieroj, iuloke fine alvenos al aliaj rezultoj ol tiuj, kiuj prefere interpretas laŭ tipologiaj, alegoriecaj, moderne histori-kritikaj, psikologiaj aŭ aliaj -ismaj metodoj.

Kvine. Jam en la Biblio mem estas rekoneblaj diversaj **teologioj** : ekzemple la kredopunktoj ("kompleto de bazaj kristanaj veroj") pleje emfazitaj de Paŭlo ne estas ĉiam la samaj kiel tiuj de Johano, de Marko aŭ en la Letero al la Hebreoj, en la t.n. Pastraj aŭ Katolikaj Epistoloj. Tio ne estas simple ia kontraŭdiro en la Biblio, sed grandaparte signo de ĝia spirita riĉeco.

Sese. Miaopinie precipa celo de la Biblio ne estas doni pli aŭ malpli multajn teoriajn informojn kaj sciojn, sed helpi establi kaj kreskigi inter homo, Dio kaj kunhomoj firmajn personajn interrilatojn karakterizatajn de fidado, esperado kaj amado. Oni povus ankoraŭ aldoni kelkajn aliajn pripensojn, sed tiuj malmultaj sufiĉu por nun.
Ĉu ni nun malesperu pro tiu granda "neunueco" ? Granda helpo por mi estas la kunuleco en mondvasta komunumo (eklezio) kaj la aktiva partopreno en nia loka paroĥo. Mia propra vivo-koncepto estas grande influata de la principo de **dialogo**. Ni ĉiuj kune kun niaj personaj vivohistorioj, spertoj, pensoj, tradiciaroj kaj "kredosentoj" estas etaj, tamen unikaj kaj ne-anstataŭigeblaj eroj en granda mozaiko, **la iranta popolo de Dio**. Se ni vivadas en reciproke malfermita, humila aŭskultado kaj honesta komunikado, ni kune eble povas reprezenti iomete la riĉecon de la fido, espero kaj precipe amo. Tiam la "ombro" de Dio mem estas videbla en nia mondo. Kaj tio estas laŭ mi pli grava ol reciproke kvalifiki la alian kiel kristanon aŭ nekristanon. Nur Dio konas la profundon de nia koro kaj de la koroj de aliuloj.
Pardonu, ke mia letero iĝis tiom longa.(...)

Altestime, samideane kaj samkrede

Heintz Platzer, Aŭstrio

el *Dia Regno*, decembro 1989

# LA DUA VATIKANA KONCILIO KAJ EKUMENISMO

Post mallonga prezento pri la antaŭ-koncilia situacio, ni parolos pri la sekvaĵoj de la Koncilio mem.

## Antaŭ la Koncilio

En la katolika mondo la ekumenisma movado disvastiĝis pli malfrue ol ĉe la posteuloj de la protestanta Reformacio. Ĉi- lastaj suferis pli akre la efikojn de la kristana malunueco. Fakte en la protestantaj kaj anglikanaj medioj oni konstatis ke la disdividiĝo ege malhelpas la evangelizon, kaj tial dum la misiista konferenco en Edinburgh (Edinburgo en Skotlando) en 1910 la kristanoj de Azio kaj Afriko petegis la maljunajn ekleziojn rezigni la konfesiajn disiĝojn, kiuj kaŭzis konfuzon kaj eĉ skandalon ĉe la evanglizataj popoloj. Tio instigis al lanĉo de ekumenismo.

La (Rom-)katolikoj, pro la unueca strukturo de sia eklezio, ne multe sentis tiun problemon. Plurfoje, nome en la jaroj 1864, 1919 kaj 1948, la katolika eklezio eĉ malrajtigis siajn fidelulojn partopreni en ekumenismaj kongresoj aŭ organizi renkontojn kun protestantoj (ni menciu, ke ankaŭ pastro Peltier estis malrajtigita partopreni en la esperantigo de la "londona" Biblio).

Tamen ne mankis inter la katolikoj klarvidaj pioniroj de ekumenismo, kiel la belga kardinalo Mercier [*mersje*] post la unua mondmilito, kaj la franca pastro Couturier [*kutürje*] en la tridekaj jaroj : ĉi-lasta konvinkite ke la preĝado de la simplaj kredantoj ne malpli gravas ol la teologia dialogo, lanĉis la spiritan ekumenismon, ĉefe per la *Preĝ-semajno por unueco* (18-25-aj de januaro), kiu iom post iom populariĝis inter la kristanoj el diversaj konfesioj.

---

ROMKATOLIKA EKLEZIO, EKUMENISMO, DUA VATIKANA KONCILIO, HISTORIA VIDPUNKTO • éGLISE CATHOLIQUE ROMAINE, OECUMéNISME, CONCILE VATICAN DEUX, POINT DE VUE HISTORIQUE • ROMAN CATHOLIC CHURCH, ECUMENISM, SECOND VATICAN COUNCIL, HISTORICAL POINT OF VUE • RöMISCH-KATOLISCHE KIRCHE, ZWEITE VATIKANISCHE KONZIL, GESCHICHTLICH GESICHTSPUNKT • IGLESIA CATóLICA ROMANA, ECUMENISMO, CONCILIO VATICANO SEGUNDO, PUNTO DE VISTA HISTóRICO • CHIESA CATTOLICA ROMANA, ECUMENISMO, CONCILIO VATICANO SECONDO, PUNTO DI VISTA STORICO.

Tamen ankaŭ la sinteno de la oficiala eklezio mildiĝis, kaj komencis montri ian intereson : iu nekatoliko tion sprite komentariis per la Evangeliaj vortoj : "Petro malproksime sekvis... por vidi la finon" (kp. Mat 26:58 ; notu ke la roma papo estas "posteulo" de Petro...).

## La Koncilio konsciigas pri la ekumenisma devo

Historia vojturno favore al ekumenismo en la katolika mondo okazis dank'al papo Johano la 23-a (1958-1963), kiu, kelkmonate post sia papiĝo iniciatis ĝeneralan koncilion de la katolikaj episkopoj (la *Duan Vatikanan Koncilion*), cele ne nur al pliboniĝo de la katolika popolo, sed ankaŭ por «inviti la disiĝintajn komunaĵojn strebi al unueco.»

Pluraj nekatolikaj eklezioj kaj komunumoj sendis delegitajn observantojn al la Koncilio, en kiu la zorgo por ekumenismo ludis gravan rolon kaj influis la postan konduton de la kristanoj. La Koncilia dekreto *Unitatis Redintegratio* (restarigo de la unueco, sigle **UR**) komenciĝas ĝuste per la jenaj vortoj :

> «La restarigo de la unueco inter ĉiuj kristanoj apartenas al la ĉefaj intencoj de la Dua Vatikana Ekumena Koncilio. Kristo fondis la Eklezion unueca kaj ununura ; kaj tamen multaj kristanaj komunumoj proponas sin mem kiel veran heredaĵon de Kristo ; ĉiuj ja asertas esti disĉiploj de la Sinjoro, sed havas diversajn konceptojn kaj trairas diversajn vojojn, kvazaŭ Kristo mem estus diversa (kp 1 Kor 1:13). Tia disiĝo ne nur malkaŝe kontraŭas la volon de Kristo, sed ankaŭ skandalas al la mondo kaj malhelpas la sanktegan aferon de la evangelia predikado al ĉiuj homoj» (**UR** 1 ; kp Mar 16:15).

La volo de Kristo estas do ke lia Eklezio estu unueca, sed bedaŭrinde en ĝi

> «ekde la pratempoj estiĝis disiĝoj (kp 1 Kor 11:18-19), severe kondamnitaj de la apostolo Paŭlo ; sed poste estiĝis pli vastaj malkonkordoj, kaj ne malgrandaj komunumoj apartiĝis disde la plena kunuleco de la katolika eklezio, foje ne sen ambaŭflankaj homaj kulpoj. Sed tiuj, kiuj nuntempe naskiĝas kaj edukiĝas en la Krista kredo ĉe tiuj komunaĵoj, ne povas esti kulpigitaj pri la apartiĝo, kaj la katolika eklezio ilin brakumas kun respekto kaj amo» (**UR** 3).

La dokumento enlistigas la motivojn pro kiu oni devas taksi ilin veraj kristanoj, kvankam en neperfekta kunuleco kun la eklezio : Ĉefe la Parolon de Dio kaj la bapton, kun la kredo en Jesuo Kristo Savanto. Ne nur la unuopaj nekatolikaj kristanoj, sed ankaŭ la respektivaj eklezioj kaj komunaĵoj devas esti rigardataj respektoplene, kiel vojoj al la kristana savo. La Koncilio ne kaŝas sian konvinkon ke en la katolika eklezio estas la veraj kredoj kaj savo-rimedoj, sed ĝi agnoskas ke multaj valoraĵoj estas ankaŭ en aliaj eklezioj, kaj konfesas ke la katolika eklezio bezonas reformon kaj aktualiĝon kaj ke ĉiuj devas strebi al profunda konvertiĝo.

La ĉefaj taskoj de ekumenismo estas : «unue ĉiuj **klopodoj** por fari parolmanierojn, juĝojn kaj agmanierojn, kiuj ne respektas kun ĝusteco kaj vero la staton de la apartiĝintaj fratoj kaj tial plimalfaciligas la reciprokajn rilatoj kun ili ; due en la kongresoj aranĝataj kun religiaj intenco kaj spirito inter kristanoj el diversaj eklezioj aŭ komunumoj. La **dialogo** inter reprezentantoj laŭdeve kulture ekipitaj, en kiuj ĉiu prezentas plej profunde la doktrinon de sia komunumo, kaj klarigas ties karakterizojn. Fakte per tia dialogado ĉiuj akiras pli veran konon kaj pli ĝustan taskon pri doktrino kaj vivmaniero de ambaŭ komunumoj...» (UR 4).

Ekumenismo devas sekvi la principojn de unueco en la esencaj, nerezigneblaj aferoj, libereco en la diskuteblaj, karitato en ĉiuj (latine *in necessariis unitas, in dubiis libertas, in omnibus caritas*).

La koncilia dokumento emfazas la devon **konvertiĝi** kiel nepran rimedon por aŭtentika ekumenismo :

«Vera ekumenismo ne eblas sen interna konvertiĝo ; ĉar la aspiro al unueco naskiĝas kaj maturiĝas el renoviĝo de la menso (kp Efe 4:23), el memrezigno kaj el plena praktikado de amo. Tial ni devas preĝpeti ĉe la Dia Spirito la gracon de sincera abnegacio, de humileco kaj mildeco en la servado kaj de frata sindonemo al la aliuloj : "Mi do, malliberulo pro la Sinjoro, petegas vin, ke vi kondutu inde laŭ la voko, kiun vi ricevis, kun ĉia humileco kaj mildeco, kun toleremo, paciencante reciproke en amo, penante konservi la unuecon de la Spirito per la ligilo de paco" (Efe 4:1-3).

Ĉi tiu admono koncernas ĉefe tiujn, kiuj estas levitaj al la sankta ordino por daŭrigi la mision de Kristo, kiu "venis ne por

esti servata, sed por servi" (Mat 20:28).
Ankaŭ pri la kulpoj kontraŭ unueco validas la atesto de la apostolo Johano : "Se ni diras, ke ni ne pekis, ni faras Lin mensogisto, kaj Lia parolo ne estas en ni (1 Joh 1:10). Pro tio ni per humila preĝado pardonpetu al Dio kaj al la disiĝintaj fratoj, same kiel ni pardonas al niaj ŝuldantoj. Ĉiuj fideluloj memoru, ke des pli ili favoros, kaj eĉ travivos praktike la unuecon de la kristanoj, ju pli ili klopodos vivi konforme al la Evangelio» (UR 7).

Ne eblas per ĉi tiu artikolo prezenti detale la diversajn aspektojn de la konciliaj deklaroj pri ekumenismo. Ni nur aldonos, ke rilate komunajn Di-servojn de diverskonfesianoj, ili havas du celojn : ĉerpi la Dian gracon kaj esprimi la unuecon. Oni rajtos laŭkaze partopreni en ili kiam tio estas rimedo por la unua celo, sed tio ne estas permesata por sajnigi neekzistantan unuecon en la kredo. Estas grava devo studi, esplori kaj preĝi por ĝuste kompreni kio do estas esenca kaj nepra, kaj kio estas libera kaj tolerebla : ĉar unueco ne signifas unuformecon ! La dekreto UR finas per jenaj vortoj :

«Ĉi tiu sankta koncilio deziregas, ke la iniciatoj de la katolika eklezio procedu kune kun tiuj de la disiĝintaj fratoj, tute ne malhelpante la vojojn de la Dia Providenco kaj ne rifuzante la estontajn instigojn de la Sankta Spirito. Ĝi krome deklaras sian konscion ke ĉi tiu intenco rekunigi ĉiujn kristanojn en la unuecon de la ununura Eklezio de Kristo, superas la homajn fortojn kaj kapablojn. Tial ĝi demetas sian tutan esperon en la preĝo de Kristo por la Eklezio, en la amo de la Patro kaj en la forto de la Sankta Spirito. "Kaj la espero ne hontigas, ĉar la amo de Dio estas verŝita en niajn korojn, per la Sankta Spirito, donita al ni"» (UR 23 ; kp. Rom 5:5).

**Post la Koncilio**

Per la koncilio kaj per la starigo de la roma *Sekretariato por la unueco de la kristanoj,* estiĝis en la eklezio tute nova etoso rilate ekumenismon. La katolika eklezio ne estas membro de la Ekumena Konsilantaro de Eklezioj, sed ĝi havas ĉe ĝi oficialajn observantojn, kaj partoprenas en pluraj ties mikskomisionoj.

La posteuloj de Johano 23-a daŭrigis sur la vojoj de ekumenismo : "Kiel

ni ankoraŭ povas resti apartaj ?" ekkriis papo Johano Paŭlo 2-a okaze de sia vizito al la ortodoksa patriarko de Konstantinoplo, la 30-an de novembro 1979.

Kelkaj iluziiĝis, ke la unueco estas baldaŭ atingota, sed fakte evidentiĝis, ke la vojo de ekumenismo estas ankoraŭ longa, ne sen laciĝoj kaj devioj, eĉ se la ekumenisma orientiĝo estas **senrevena proceso**, kiel plurfoje emfazis papo Johano Paŭlo 2-a. Intertempe ekumenismo alprenis diversajn formojn :

**Hierarkia ekumenismo** : altrangaj kontaktoj : historiaj estis la renkontoj de **Johano 23-a** kun la anglikana primaso ĉefepiskopo **Ramsey**, de **Paŭlo 6-a** kun la ortodoksa ekumena patriarko **Atenagoras**, kaj la subskribo de komuna kredo de **Johano Paŭlo 2-a** kun la siria-ortodoksa (antaŭkalcedona) patriarko **Zakka 1-a Iwas**.

**Teologia ekumenismo** : rimarkindas la mikskomisionoj duflankaj, katolika kaj respektive ortodoksa, anglikana, metodista, luterana, baptista, ktp. Intensa estas amkaŭ la teologia kunlaboro kun la Ekumena Konsilantaro de Eklezioj, al kiu aliĝis pli ol 300 eklezioj aŭ komunumoj el 150 landoj ; plej rimarkinda frukto estas la *Lima Dokumento pri bapto, eŭkaristio kaj servado (BES)*. Ankaŭ la historiaj studoj (ekz-e okaze de la 5-a jarcento de la naskiĝo de Luther) fariĝas malpli partiemaj kaj pli konverĝaj.

**Spirita ekumenismo** : pluraj preĝadaj kaj karismaj movadoj taksas grava la taskon preĝadi por elpeti la donacon de unueco laŭ la volo de Kristo.

**Karitata ekumenismo** : la praktiko de reciprokaj amo, pardono, helpo, gastigo, kaj la kunlaboro en humanaj kampoj tre helpas al ekumenismo. Ni menciu almenaŭ la kunvenon en Basel, Svislando (somere 1989) de ĉiuj eŭropaj eklezioj, por *Justeco, Paco kaj Konservado de la Kreitaĵo*.

**Baza ekumenismo** : ekumenismo ne povas resti afero de elitoj, altranguloj aŭ fakuloj ; ĝi devas fariĝi sindevigo de la tuta kristana popolo. Ĉi-koncerne ni konstatas ke la situacioj diversas en la diversaj lokoj.

Por kompleteco ni mencias ankaŭ malaprobindajn faktojn, kiuj bonŝance koncernas nur etajn minoritatojn.

**Integrismo** : kelke da katolikoj tute malakceptas ekumenismon, kiun ili

taksas perfido de la vera kredo. Inter ili estas episkopo **Lefèbvre** (*löfevr'*), kiu estas ekskomunikita de la katolika eklezio.

**Prozelitismo** : emo varbi per mallojala propagando anojn el aliaj konfesioj.

**Irenismo** : ĝi estas la mala ekstremismo de integrismo, kaj konsistas en la emo atingi kuniĝon ĉiukoste, eĉ rezignante esencajn kredo-punktojn.

Kia estu **laŭdeva dialogo**, kontraŭ eblaj devioj, klarigis papo Paŭlo 6-a en la encikliko *Ecclesiam suam* (Sian Eklezion, 1964). Ni citas fragmenton de ĝi :

> «Antaŭ ĉio konvenas, ke la dialogo distingiĝu per la **klareco** ; ĉio dirata estu nete komprenata de la aŭskultantoj : okazu kvazaŭ efektiva transfuzo de la pensoj ; la interparolo efiku kiel ekscitilo liberiganta kaj stimulanta la plej eminentajn kapablojn de la spirito kaj de la intelekto. La klareco estas kvalito tiel alta, ke per si sola ĝi jam sufiĉus meti la dialogon en la nombron de la plej rimarkindaj aferoj, kiujn kapablas krei la homaj lerteco kaj klereco ; la postulo de klareco krome instigas nin kontroli kun apostola vigleco, ĉu nia esprim-maniero estas senpene komprenebla, ĉu ĝi taŭgas por kapti la intereson de la publiko, ĉu ĝi eble ankoraŭ bezonas poluron.
>
> Krome necesas, ke nian dialogon akompanu tiu **mildeco**, pri kiu Kristo admonis nin, dirante : "Lernu de mi, ĉar mi estas milda kaj humilkora" (Mat 11:29) ; ne decas ja, ke nia dialogo ŝvelu de aroganteco, uzu vundantajn terminojn, akre ofendu la homojn. Sian aŭtoritatecon ĝi ĉerpu el tio, ke ĝi manifestas la veron, dissemas la donojn de la karitato, prezentas ekzemplojn de virto, ne procedas per komandoj, nenion altrudas. Ĝi estas ĉiel pacama, forĵetas ekcesajn argumentojn, toleras kontraŭojn, inklinas al larĝanimeco.
>
> Plie, fideme ĉiam gravas, jen rilate ĉies asertojn, jen rilate ĉies volon akcepti la ĝustajn dirojn de aliaj homoj. Se tiel komprenita, la dialogo favoras la konfidon kaj la amikecon, instigas la animojn al konsento pri tiu Bono, kiu prave ekskludas ĉian tendencon egoisman.

EVANGELIAJ KAJEROJ

Fine, la dialogo postulas psikologian spertecon, kiu plej diligente determinas, kiaj estas la motivoj de la aŭskultanto, kia lia honesteco (Mat 7:6), kaj liaj spiritaj kondiĉoj : ĉu nome li estas naiva, aŭ nepreparita, aŭ suspektema, aŭ rekte malamika. La parolanto penu koni la animstaton de la aŭskultanto, por ke, se la racio tion postulos, li mem ne hezitu modifi ion en si aŭ en sia maniero prezenti la aferojn ; li zorgu agi tiele, ke neniam li fariĝu malagrabla aŭ nekomprenebla al la aŭskultanto.»

## Konklude

En la nuna jarcento ekumenismo faris gigantajn antaŭenpaŝojn, sed ankoraŭ longa estas la vojo trairenda. Ni devas strebi sekvi Kriston, sub la gvidado de la Sankta Spirito, por atingi la unuecon en la tempo kaj en la formo kiujn Li volos.

Battista Cadei, Italio

---

Battista CADEI, italo (1937), romkatolika pastro de 1963, doktoro pri klasika filologio, instruisto pri greka kaj latina lingvoj, vicparoĥestro, eksredaktoro de la Esperanto-sekcio ĉe Radio Vatikana.

# V O Ĉ O J   K R I S T A N A J

serieto celanta aŭdigi la plej diversajn voĉojn
de Kristanismo
de liberala ĝis ortodoksa
de rom-katolika ĝis protestanta
sendepende de dogmaj limigoj
depost Prakristanismo ĝis la nuno
intern-eklezie, ekumene, interreligie kaj tuthomare

aperis ĝis nun nur kelkaj numeroj. ĉiu numero estas plene memstara. kiu havas ion seriozan por prezenti por la serieto, sciigu ĝin. kiu volas subteni nian entreprenon, ĉu per donaco (kio neniam jam okazis!) aú per aĉeto, tiu ĝin faru. diskonigu niajn eldonaĵojn!

Jam aperis:

1 La Evangelio laŭ Petro & La Morto de Jesuo kaj kio poste? apokrifa evangelio kaj originala eseo. 12 paĝ. 1,80 guld.

2 Tertuliano - Apologio (el la jaro 197 p.Kr.) gravega latina verko el la frua eklezio. trad. Gerrit berveling. 116 p. 9,90 guld.

3 Sin-konservo eseoj k predikoj pri kristanismo k nukleaj armiloj. 52 p. 6,30 guld.

4 Al Diogneto apologieto el la komenco de la 2a jc trad. el la helena de Isai Sumber. 16 p. 1,80 guld.

ĉiuj ĉi en dua eldono

5 Kenneth Twinn - Unitariismo; skizo pri la kredoj historio k organizo de la religiuloj nomitaj Unitarianoj.la aŭtoro estas unitaria pastro. 24 p. 1,80 guld.

7 Gerrit Berveling - Dio/Kristanismo/Aliaj Religioj. studaĵo pri "teologio de la religioj". 36 p. 4,20 guld.

8 La Evangelio laŭ Maria Magdalena prelego k traduko de la fragmentoj restantaj de apokrifa evangelio. grava pro la rolo de virino kiel 'apostolo'. 12 p. 1,80 guld.

9 Jam Temp' Está!; la "Kairos-dokumento" de Sud-afrikaj kristanoj. kontraŭ ras-apartigo en Sud-Afriko. grave influa verko. 32 p. 4,20 guld.

10 Beatrijs. mezepoka rom-katolika Maria-legendo. el la nederlanda. 24 p. 3 guld.

11 Isai Sumber - Kie oni trovas tion en la Korano? malgranda konkordanco pri la Korano. utila por interesiĝantoj pri interreligia interparolo. 32 p. 4,20 guld.

12 Tertuliano - Kuraĝigo al la Martiroj. por edifo de estontaj martiroj, enkarcerigitaj en Kartago. ĉ 197 p. Kr. el la latina. 12 p. 1,80 g.

13 Kantu al la Eternulo. kantaro de (ĉefe ĉeĥaj) kristanoj. trad. el diversaj lingvoj de Jiří Kořínek k.aliaj. 44 p. 6 guld. 2a eld.

14 M. de Goeij - La virino en la judismo. el la nederlanda. 48 p. 6 guld.

15 SeK.E.L.I.poetas - poemoj el la rondo de K.E.L.I. komuna eldono de K.E.L.I. kaj VoKo okaze de la 100-jariĝo de Esperanto. 48 p. 6 guld.

16 Francisko de Asizo - Kantiko de l' Kreitaĵoj. dulingva. 12 p. 1,50 guld.

17 Ekumena Jardeko de Eklezioj en Solidareco kun Virinoj. teksto de la monda konsilio de eklezioj. 20 p. 2,10 guld. el la angla.

18 Johano Hus - Defendo de la libro pri la Triunuo. 18 p. 3 guld. el la latina.

estas pluraj titoloj en preparo

eld VoKo
Muiderslotstraat 69
4834 KM BREDA
Nederlando

# EKUMENISMO : ATENTU !

Mi naskiĝis en 1907, kaj mi bone rememoras, ke dum mia tuta junaĝo kaj eĉ ĝis antaŭ ĉirkaŭ kvar jardekoj, inter homoj estis malamikeco pro ilia aneco je diversaj eklezioj. Kaj se ni esploras ankoraŭ jarcenton pli fruan, ni legas, ke junuloj el religie diversaj vilaĝoj interbatalis ankaŭ fizike. Ekumenismo ebligis tiurilatajn ŝanĝojn. Kvankam ekzemple por romkatolikoj restis malpermeso preni la "manĝon de la Sinjoro" el la manoj de nekatoliko.

## Ĉu la Papo ?

La kaŭzoj por la estiĝo de ekumenismo estas diversaj. Same kiel la esperoj pri ĝiaj rezultoj. Romkatolikoj ekzemple diris, ke per ekumenismo ĉiuj kristanoj subiĝu al la "Papo" kaj ke tiel kresku ties potenco. Sed potenco ĉiam igas la homon "vidi sur sian propran vojon", "memrealiĝi", kvankam tiu estas **LA** peko (Jes 53:6). Kaj oni spertis, ke la celado de la spirito fariĝas des pli malfacila, ju pli grandiĝas la ekstera potenco. La Biblio diras, ke ne okazu per militistaro aŭ potenco, sed per la Spirito de Dio (Zeĥ 4:6).

## Ĉiuj estu unu

Kaŭzo por ekumenismo inter protestantoj estis kaj estas la peto de Kristo en sia *pastra preĝo* ke ĉiuj estu unu (Joh 17:21). Sed **oni bone atentu, KIAN unuecon Kristo volas** ! En sia preĝo Kristo daŭrigas "kiel vi **Patro** en mi kaj mi en Vi". Kristo parolas al la **Patro** kiel alia persono (ekz-e Mat 3:17). Kristo do volas ne kunfandiĝon kun la **Patro** al unu sola persono, sed la harmonion aŭ komunan sonadon kunan (Joh 5:19-23). Kaj tion ankaŭ Kristo celas inter ĉiuj disĉiploj tiamaj kaj nunaj kaj estontaj. Kiel membroj de unu korpo reciproke servas, ĉiu membro laŭ sia propra formiĝo kaj eblo kaj destino, tiel ankaŭ la membroj de Kristo (1 Kor 12).

---

**EKUMENISMO, EVANGELIKA FUNDAMENTISTA VIDPUNKTO** · OECUMéNISME, POINT DE VUE éVANGéLIQUE FONDAMENTALISTE · ECUMENISM, EVANGELICAL FUNDAMENTALIST POINT OF VUE · öKUMENISMUS, EVANGELIKAL FUNDAMENTALIST GESICHTSPUNKT · ECUMENISMO, PUNTO DE VISTA EVANGéLICO FUNDAMENTALISTO · ECUMENISMO, PUNTO DI VISTA EVANGELICO FONDAMENTALISTO.

## Membroj en la korpo

La piedo servu alimaniere ol la mano, la okulo alimaniere ol la orelo laŭ la gvido de la spirito. Same ĉiu kristano laŭ la gvido de Kristo en li (Mat 23:8-10). Tiel ankaŭ ĉiu loka aro da kristanoj menciita en la Biblio, estas sendependa eklezio kun specialaj ecoj. Ne estu spirita potenco de unu super alia ; ilia unu gvidanto ne estas videbla per ĥemiaj okuloj, li estas ĉeflanke de la eterna **Patro** (Mar 14:62).

## Sentoj

Ekumenaj aranĝoj ĝenerale kreas aron de sentoj. Kiam oni legas pri ekumenaj diservoj aŭ kunvenoj, iel raportiĝas je "harmonio". Estas la merito de tiuj harmoniaj sentoj, ke inter la anoj de diversaj eklezioj malkreskas la malamikeco kaj la malrespekto. Oni nun strebas kompreni unu la alian.

Sed por ke la eklezioj povu reciproke servi, ili devas ekkoni ĉiu sian specialan taskon rilate alian ; simile kiel la membroj de nia korpo devas koni sian servon kaj adapti al ĝi. Miksiĝo de niaj korpaj membroj ilin igus neuzeblaj.

## Kies vero

Per sia estiĝo aŭ kunvenmaniero kaj instruoj, ĉiu eklezio admonu aliajn je ia ver-ero :

* Ekzemple, ke la Sankta Spirito volas gvidi ĉiun kredanton dum Diservo, ke li alportu por la edifo de ĉiuj (1 Kor 14:26),

* Ekzemple, ke ĉiu ankaŭ en privata domo rajtas servi por la Manĝo de la Sinjoro aŭ Eŭkaristio (Agoj 2:46),

* Ekzemple, ke neniu nomiĝu papo aŭ spirita patro (Mat 23:9) - per «sankta **Patro**» Kristo parolas nur al Dio, laŭ Joh 17:11,

* Ekzemple, ke la seksuzo kiel de Dio kreita (Gen 1:28), decas ankaŭ por tiuj, kiujn Dio vokis al tuttempaj servoj en Eklezio (1 Kor 9:5 ; 1 Tim 3:2),

* Ekzemple, ke neniu ion aldonu aŭ deprenu je la volo de Dio (komparu Agoj 22:18-19) : nenio en la Biblio diras, ke Petro estis en Romo aŭ ke Romo havus specialan signifon por kristanoj, aŭ ke por Petro oni elektu posteulon,

* Ekzemple, ke la publika konfeso de Petro (i.a. Mat 16:16) multlande kaj je ĉiuj tempoj kaj eklezioj pretigis homojn al evangelizaj servoj : homoj, kiuj estis eroj en la roko Jesuo Kristo, fariĝis firmaj bazoj por fondi aŭ konstrui lokajn ekleziojn. Post Petro kaj Paŭlo, inter aliaj tiaj estis Augustinus (Aŭgusteno), Luther, Pierre Valdo, Zinzendorf, Spurgeon [*spörĝn*], Modersohn, Sadhu Sundar Singh, Graham. Kion tiaj homoj predikis, estis partoj de tiu konfeso de Petro : Jesuo Kristo **sole** estas tiu, per kiu Dio savas kaj la vortoj de Kristo venas el senfina konscia vivo por tien konduki.

Kie orela konfeso estas deviga, oni povas aŭdi de eklezianoj : "ni ne diras tion, kion li volas aŭdi". Do, estas danĝero de hipokriteco. Aliaj eklezioj, en kiuj la Biblia vorto kaj la prediko pli staras en la mezo, devas des pli varbi por veremo.

**Kaj ĉe aliaj**

Sed aliflanke, en kelkaj "eklezioj de la Vorto", okazas la danĝero, ke oni kondutas kvazaŭ oni estus pli saĝa ol la biblia Vorto aŭ revelacio : ke oni emas kritiki la Biblion aŭ foje eĉ volas "pliboniĝi" ĝin. Kontraŭ tiaj okazoj aliaj eklezioj havas la grandegan taskon, varbi por respekto kaj por korpieco. Tiu tasko ofte eĉ povas esti plenumita kie la tradicio ne konformas al la Biblio kaj tial ne povas esti el la Sankta Spirito.

**Sub sama kupolo ?**

Se tiaj diversaj specoj da eklezioj estus miksitaj aŭ sub komuna organizacio, ili ne povus plenumi la taskojn. Sentoplena ekumenismo ne povas doni la konscion, ke sub Dio ni nin reciproke admonu kaj gardu. Laŭ la donacoj kaj energioj, kiujn Dio donis (1 Kor 12), ni agu por la bono de aliaj. Kaj ni ricevu korektigon de aliaj, ĉar Dio volas ilin uzi ; Dio ĉiun edukas per aliaj, ankaŭ nin kaj nian propran eklezion. Sentimentala ekumenismo havis taskojn, sed ĝi kiel ĉiuj portempaĵoj ankaŭ havas danĝerojn. Kaj ĝi povus igi nian propran eklezion, kiu ajn ĝi estas, sentaŭga por tiaj taskoj, kiujn ĝi plenumu laŭ la volo de Dio. **Amo**

Tamen estas unu tasko, kiun Dio donis al ĉiu afero, al ĉiu eklezio, kaj eĉ al la plej sentoplena ekumenismo : ĉio konduku aŭ eduku al tiu DIA AMO, kiun la helena pralingvo de la Nova Testamento nomis AGAPE (1 Kor 13). Per ĝi stariĝu vera unueco en memstareco laŭ la preĝo de Kristo en Joh 17, ĉar en la libereco de Kristo ni per tiu Dia amo servu ĉien kaj al ĉiuj laŭ liaj donacoj.

Th. Wilhelm Teich, F. R. Germanio

# DUVOĈE PRI LA DOMBES-GRUPO

## La Dombes-grupo estas 50-jara

En 1937 naskiĝis tiu ĉi plurkonfesia grupo, kiu longatempe laboris en silento, kaj kiun de dekkvino da jaroj vaste konigis ties publikigitaj tekstoj.

Komence svisaj protestantaj pastoroj havis la ideon inviti katolikan pastron el Lyon (Liono) por kune pripensi kaj preĝi. Reveninte al Lyon, li rakontis la mirindan etoson de tiu ĉi renkonto, kiu estis kiel «unua prezento» ek de la disiĝo de la Reformacio, al sia amiko la abato Couturier [*kutürje*]. Tiu ĉi tiam havas la krean intuicion : kunvenigi por pluraj tagoj katolikoj kaj protestantoj el Francio kaj Svislando en repaciga etoso. La unua renkonto okazis la saman jaron en la cisterciana abatejo de Dombes [*Dŏb*], norde de Lyon. La samaj retroviĝis la postan jaron en svisa protestanta domo. Poste, escepte de kelkaj jaroj sen okazigo pro la milito, la grupo regule retroviĝis la unuan semajnon de septembro, alternative en la abatejo de Dombes, kaj en diversaj protestantaj akceptodomoj. Ekde 1972, ĝi ĉiam retroviĝas en Dombes, pro aranĝaj kialoj. Tial ĝia nomo.

Nune la grupo konsistas el 40 membroj (20 + 20) kun 2 kun-prezidantoj (pastoro Alain Blancy kaj Pastro Maurice Jourjon), kaj sen skribita regularo, sen difino, ĝi fidele vivas la gvidajn intuiciojn de la fondintoj, resumeblajn en tri nedisigeblaj elementoj : rigora kaj honesta **teologia esploro**, aŭtentika **dialogo** bazita sur frata konfido, etoso de komuna **preĝo** en kiu disvolviĝas la tuta vivo de la grupo.

En la komenco, la partoprenantoj estis, por diri, "vizaĝo kontraŭ vizaĝo", ĉiu strebante pli bone kompreni la alian, pridemandante unu la alian. Iom post iom, tiu ĉi aliro nesenteble kuniris kun alia : ni parte estas "flanko al flanko", kune esplorante por vidi kiel niaj eklezioj

---

EKUMENA GRUPO, FRANCIO, HISTORIA VIDPUNKTO · GROUPE OECUMéNIQUE, FRANCE, POINT DE VUE HISTORIQUE · ECUMENICAL GROUP, FRANCE, HISTORICAL POINT OF VUE · öKUMENISCHE GRUPPE, FRANKREICH, GESCHICHTLICH GESICHTSPUNKT · GRUPO ECUMéNICO, FRANCIA, PUNTO DE VISTA HISTóRICO · GRUPPO ECUMENICO, FRANCIA, PUNTO DI VISTA STORICO.

povus vivi, ne perfidante sian plej profundan heredaĵon : **metanojo** (greke METANOIA), kie la disigaj diferencoj fariĝus ne-disigaj kaj pliriĉigaj diferencoj.

Paŝon post paŝo, la publikigitaj tekstoj de la grupo antaŭeniris sur ĉi tiu vojo.

**La tekstoj**

De 1972, la Dombes-grupo eldonis plurajn libretojn, rezultoj de siaj laboroj. La unua estis *Al sama eŭkaristia fido ?* La demando-punkto indikas la humilecon de la propono. Tamen ĉi tiu libreto konis grandan sukceson. Ĝi venis en trafa momento, kiam la kristanoj disigitaj suferis, ĉar ili ne povis ricevi kune la **Manĝon de la Sinjoro.** Malgraŭ la restantaj malfacilaĵoj, katolikaj kaj protestantaj teologoj diris sian akordiĝon pri la kerno : Jesuo Kristo estas ĉeestanta en la sakramento.

Sed la prezidado de la sakramento restas la malfacilaĵo inter la eklezioj pri ĉi tiu temo, tial la grupo studis poste la demandaron pri la **servadoj** [fr. ministére, an. ministry, ge. Dienst], kaj eldonis *Por repacigo de la servadoj*. Tie ankaŭ akordo pri gravaj punktoj estiĝis : la Eklezio de Jesuo Kristo ne povas vivi sen la servistoj, donaco de Dio al Lia Eklezio.

Tiuj pripensoj kondukis la grupon al aparta servado, la **episkopa.** Poste kvara libreto : *La Sankta Spirito, la Eklezio kaj la sakramentoj*, kiu montras kiel funkcias la servadoj en la Eklezio.

La laste eldonita verko de la grupo zorgas pri speciala servisto : *La servado de kunuleco en la universala Eklezio* (alie dirita la **papeco**).

Ĉi tiuj libretoj aperis en la franca, kelkaj en aliaj lingvoj, sed neniu en Esperanto. Pasintan jaron ili estis kolektitaj en unu libro, al kiu estas almetitaj la tezoj kiuj preparis la laboron esprimitan en la libretoj.

**Katolika vidpunkto**

Partopreninte fidele ek de 1951 en la Dombes-grupo, mi povas atesti pri

la neanstataŭebla profito, kiun reprezentas vera dialogo. Tiuj interŝanĝoj estas multe pli ol nur honestaj kaj amikaj. Ili ne estas debatoj, kie ĉiu aŭskultas la alian nur por cerbume eltrovi en la argumentado la punkteton, kie li povos siavice almeti la venkantan argumenton. La vera dialogo, kies ekzemplon montras la Dombes-grupo, konsistas en aŭskultado de la alia kun bonvolo por provi kompreni kiel li kaj lia eklezio ligas, unuflanke, la Biblion kaj la apostolan eklezion kun, aliflanke, lia lingvo, lia vivo, kaj ĝiaj institucioj hodiaŭ. Des pli la vera dialogo ne estas mallaborema konsento. Oni demandas la aliulon profunde kaj senindulge, ne por ĝeni lin, sed por serĉi kun li. Li eble venos al agnosko de malfacileco, al malfermiĝo, al esploro kaj al nova aŭskultado pri "kion la Spirito diras al la Eklezioj." Kaj tio en prefekta reciprokeco ! Tiu originala aliro estas pli malfacile klarigata ol ekzistade vivata, sed certe estas ebla nur inter homoj, kiuj sufiĉe konas unu la alian por tute fidi reciprokan sincerecon. Kaj tiu serĉo okazas en preĝa etoso.

Tiun ĉi veran dialogon mi certe same trovis en Francujo en aliaj grupoj, en kiuj mi partoprenis, kiel la miksaj komitatoj de dialogo katolika-protestanta aŭ katolika-ortodoksa, aŭ ankoraŭ en tiuj etaj renkontoj kun nur kelkaj, ĉe la bazo. La Dombes-grupo, laŭŝajne, akiris al si apartan lokon dank'al sia daŭro, sia rigoro, sia spirito, finfine tre evangelia.

Kaj mi ekrevas : se la kristanoj de ĉiuj eklezioj povus, ĉiu laŭ la mezuro de sia situacio kaj de siaj eblecoj eniri en saman alpaŝon !...

## Protestanta vidpunkto

Kion aldonas la Dombes-grupo al protestanto ?

1. La remalkovron de la universaleco de la Eklezio tra la tempo kaj la spaco. Kristanismo ne komenciĝas de la deksesa jarcento sed la movo de la Reformacio enradikiĝas profunde en la okcidento.

2. La protestanto renkontas alian manieron vivi la fidon en Kristo. Tio estas pliriĉiĝo sed ankaŭ pridiskuto pri si mem, ĉiam ĝis ekŝanceliĝo : tio estas la signo de aŭtentikeco, de nova dimensio en la vivado de kristanismo.

3. La protestanto estas tentata neprecize eldiri sian fidon. La Dombes-grupo devigas lin esti pli strikta en siaj esprimaĵoj, zorge elekti inter tio, kio devenas de la kulturo kaj de la historio, kaj tio, kio estas la kerno de la fido.

4. Tiu laboro de precizo tuŝas ankaŭ la vortaron. Ĉiu vorto kion ni uzas, estas ŝarĝita de sentemo, kiu ne estas sama en iu komunumo kaj en alia. Estas necese pacience aŭskulti sin reciproke, por lerni la sencon, kiun alia uzas.

5. Dialogi ne estas malaperi en la alian. Kontraŭe, ĝi ebligas pli bone pripensi pri sia teologia heredaĵo, kiu ne estas forĵetita sed, kiu akiras sian veran valoron. Necesas retrovi siajn radikojn por vivi la ekumenismon.

6. Ne temas pri sinkulpigo. En la ekumenisma dialogo, la protestantismo devas ricevi kaj ankaŭ doni sen orgojliĝi. Du punktoj ŝajnas al mi pli gravaj :

a) la unua rolo de la Skriboj kiel fundamento de la aŭtoritato por la fido. Ja tiu aŭtoritato por la fido estas akceptita de ĉiu eklezio, sed ĝi devas esti senĉese asertita.

b) montri al la fratoj de la aliaj eklezioj, sed ĉefe al la katolikoj, ke ekzistas malsama maniero vivi la kristanan fidon, mi diras «alternativa» pieco.

René Girault kaj Alain G. Martin, Francujo

---

René GIRAULT (*Ĵiro*) Romkatolika pastro, estris la Teologian Centron en Poitiers, poste la nacian Sekretariaton por la Unueco de la Kristanoj. Verkis diversajn librojn. Agas interalie en Pax Christi.

Alain Georges MARTIN (1933), franco, pastoro de la Franca Reformita Eklezio, d-ro pri teologio, edzo kaj patro de 3 infanoj, prez. de la franca sekcio de KELI.

# EKUMENA SITUACIO EN ĈEĤOSLOVAKIO

Malsame de la unuigaj tendencoj de Vatikano, kiu strebas al unueco de la Eklezio, en kadro de la Rom-katolika Eklezio, Ekumena Konsilantaro de Eklezioj strebas al unueco de la eklezioj, respektante la individuecon de ĉiuj membraj eklezioj.

## Ekumena Konsilantaro de Eklezioj

Kiam en la jaro 1948 en Amsterdam estis fondita Ekumena Konsilantaro de Eklezioj, vivis nekatolikaj minoritatoj en Ĉeĥoslovakio ankaŭ en relative reciproka izoleco. En la jaroj 1950 ekkreiĝis la unua modelo de organizita ekumenismo. En la jaro 1919 la episkopo Söderblom el Uppsala eldonis la unuan proponon por kreiĝo de Ekumena Konsilantaro de Eklezioj. Estis antaŭ-vidita la konstituiĝo de EKE, kun sidejo en Genéve (*Ĝenevo*). El Ĉeĥoslovakio eniris en ĝin tri eklezioj : Evangelia ĉeĥ-frata, Evangelia slovaka de Aŭgsburga Konfesio (luterana) kaj Reformita kristana en Slovakio (kalvinana).

## Ekumena Konsilantaro de Eklezioj en Ĉeĥoslovakio

Cele al konstituiĝo de la *Ekumena Konsilantaro de Eklezioj en Ĉeĥoslovakio* (EKEĈ) ĉeestis kelkaj delegitoj en la dua ĝenerala kunveno de EKE en Evanston [*ivanston*] en 1954. La praga (Praha, Prago) fokuso estis spirite reprezentita de Prof. J. L. **Hromádka** kaj de B. **Pospíŝil**. La dua fokuso estis en Bratislava. Ĉe formala konstituiĝo de la EKE en Ĉeĥoslovakio, la 20.06.1955, estis akceptitaj ankaŭ la Silezia evangelia eklezio de Aŭgsburga Konfesio, la Ĉeĥ-frata unuiĝo, la Evangelia metodista eklezio (ECM), la Frata unuiĝo kaj post duona jaro la Frata unuiĝo de baptistoj. En la hejma bazo estis renovigita la komuna preĝ-semajno ekde januaro 1956, tradicio de la Evangelika Alianco (la unua semajno de januaro, kun komunaj kunvenoj kaj komunaj temoj).

## Kristana Pac-Konferenco

La nova fazo de aktiveco estas datita de oktobro 1957, kiam en Modrá

---

**ĈEĤOSLOVAKIO, EKUMENISMO** · TCHECOSLOVAQUIE, OECUMENISME · CZECHOSLOVAKIA, ECUMENISM · TSCHECHOSLOWAKEI, öKUMENISMUS · CHECOSLOVAQUIA, ECUMENISMO · CECOSLOVAQUIA, ECUMENISMO.

Ĉe Bratislava kunvenis profesoraj grupoj de *Slovaka evangelia teologia fakultato* (dekano Dr J. **Michalko**) kaj de *Comenius evangelia teologia fakultato* (dekano Dr J.L. **Hromádka**). Tiu ĉi kunveno esprimis sin por subteno de ĉiuj registaroj de la ŝtato, senrigarde al ilia socia sistemo, en honesta strebo por kunekzisto. La unua paŝo al populareco de tiuj ĉi pensoj estis *Ekumena Pac-Konferenco de Eklezioj en Bohemujo*, okazinta en ĉeesto de 200 delegitoj en decembro 1957. Tuj post la komenco de la paca aktiveco, EKEĈ celis ankaŭ eksterlanden. La unuaj internaciaj konferencoj okazis en Praha. Tiel elkreskis la sekretariato de *Internacia Kristana Pac-Konferenco*, kies prezidantecon akceptis Dr. **Hromádka** kaj kies ĝenerala sekretario, post la morto de S-ro B. **Popíŝil**, fariĝis paroĥestero de Ĉeĥfrata eklezio evangelia Dr. Jaroslav **Ondra**. EKEĈ koncentriĝis tiel je propagando de Kristana Pac-Konferenco. En al jaro 1964 aliĝis al la ekumena laboro la Ĉeĥoslovaka husana eklezio kaj poste ankaŭ la Ortodoksa eklezio. La unua administra centro de EKEĈ estis organizita en la jaro 1965.

## Ekumena Konsilantaro de Eklezioj en Bohemujo

Impulso al nova organizo de ekumena laboro eliris de la ŝanĝo de ŝtata kaj jura organizo en Ĉeĥoslovakio, kiel federacio de Ĉeĥoj kaj Slovakoj. Post oficialaj klopodoj la statuto de *Ekumena Konsilantaro de Eklezioj en Bohemujo* (EKEB), malfermita al kunlaboro kun eklezioj de Slovakio, estis aprobita de la ministro pri kulturo de Bohemujo. EKEB estas laŭstatute konsila organo de gvidantaj ekleziaj reprezentantoj. Per ekumena fundamenta realeco estas renovigita intereso por respondeca studo de la Biblio, kiu gvidis al ekkono, ke la plej atesta modelo de ekumenaj rilatoj estas sama biblia kanono, kiu enhavas skribajn atestecojn el diversaj ofte diferencaj kristanaj grupoj, sed pli akcentas ilian komunan bazon en la verko de Jesuo Kristo, ankaŭ ilian komunan esperon. Evangelia sekcio strebas perigi rektan kontakton pere de laboraj ekumenaj konferencoj. Ĉiuj eklezioj povas je ili delegi siajn membrojn, kiuj vere ekumene laboras. Krom tio tiu ĉi sekcio aranĝas ekumenajn preĝ-semajnojn. Ĉiuj teologiaj fakultatoj katolikaj kaj ne-katolikaj (ekz-e Comenius kaj Husana, en Praha) edukas studentojn por ekumena laboro. EKEB estas en Praha-Karlín, kunigas ĉiujn ekleziojn en Ĉeĥoslovakio, t.e. 20 ekleziojn. Kun katolika eklezio oni nur kunlaboras. Krom EKEB manifestiĝas la ekumenemo de nekatolikaj eklezioj en Bohemujo en **Kostnická unio**, kiu ne kunigas ekleziojn, sed individuajn membrojn. Tiu ĉi agado iras ne nur paralele, sed ankaŭ multe en kunlaboro kun EKEB.

## Kaj la Ŝtato ?

La prezidanto de la registaro de Bohemujo agnoskis, ke eraroj estis faritaj kaj ke ili strebas al plibonigo de la rilatoj inter la Ŝtato kaj la eklezioj. Al katolikoj estis permesita konsekro (ordino) de du episkopoj, noviciĝo por virinaj ordenoj, Ĉefe en socialaj institucioj, domoj por pensiuloj, kaj institutoj por mensmalfortaj infanoj. Beadŭrinde diakonio estis likvidita per Ŝtata leĝo pri eklezio en 1950. Kadre de rekonstruo montriĝas nur malgranda ebleco organizi kaj denove realigi tiun Ĉi laboron en Ĉeĥoslovakio. La rilatoj inter la Ŝtato kaj la eklezioj tre pliboniĝis. Ĉiuj eklezioj estas egalrajtaj kaj Ĉiuj pastoroj kaj pastroj ricevas salajron de la Ŝtato.

teksto prezentita en Annan Court de D-ino L. Bláhová

# INSTRUKCIOJ POR LA KUNLABORANTOJ

Nun mi redaktas kaj la revuon *DIA REGNO*, kaj la revuon *Evangeliaj Kajeroj*.

La instrukcioj validas por ambaŭ. Tamen la respektiva enhavo ne estos sama. La periodeco havas rolon en tio. *DIA REGNO* estas monata revuo, kaj sekve devas esti pli proksima al la aktualeco. *DIA REGNO* estas ankaŭ liga organo de **KELI**, kaj estas iomete pli specifa. *Evangeliaj Kajeroj* estas kristana revuo, kiu volas aŭdigi la diversajn kristanajn voĉojn. *Evangeliaj Kajeroj* pritraktas unu temon, kaj ĉar nur duonjare povas tion fari pli longe (funde, tio dependas de la aŭtoroj). Ĉar la titolo «*Evangeliaj Kajeroj*» povas misinterpretiĝi, mi atendas viajn proponojn por nova titolo.

Mi redonos kelkajn punktojn el la instrukcioj por la kunlaborantoj de *Evangeliaj Kajeroj*, validaj por ambaŭ.

**Sendado de tekstoj:**
Por la redaktado, mi uzas komputilon, *Atari 1040* . Se vi povas uzi saman aŭ alian el la serio *ATARI ST* , vi povas sendi viajn tekstojn per disketo. Se vi bezonas oni povas sendi al vi program-disketon. La komputilo povas ricevi tekstojn en ASCII-formo el MSX 2 kaj el IBM PC-kongruaj maŝinoj, ĉu en 5", ĉu en 3"5. De aliaj maŝinoj mi ne scias. Mi provis el disketo de *Macintosh* kaj ne sukcesis. Por alia grandeco de disketo, mi ne povas legi. Sed eble ni provu sendi tra telefon-linio kaj modemoj. Mi disponas programon por tio, *Emulcom 3*, kiu ankaŭ permesas la protokolon **Kermitt**.

Se vi havas nur tajpmaŝinon, vi sendu viajn tekstojn kun duobla inter-linio, sur papero de formato A4 (21 x 29.7 cm), kun granda marĝeno. Unu paĝo estu proksimume 30 linioj de 55 literspacoj.

La notoj kaj la bibliografiaj referencoj estu ĉe la fino, anoncitaj de numero en la teksto. Oni indiku interkrampe () en la teksto la bibliajn referencojn. Kiam eblas oni referencu eĉ la bibliajn aludojn.

En urĝaj kazoj, por ne tro longa teksto, vi povas uzi «**telefax**» (telekopiilon) al numero (+33) 49 43 93 72 [al tiu numero ne post decembro 1990].

**Litertipoj kaj substrekoj :**

citiloj, ĉirkaŭ parto kun plia marĝeno :
- citaĵo " "

citiloj, ene de la teksto :
- mallonga citaĵo (kelkaj vortoj, frazeto)
- vorto, esprimo, specife uzita de menciita aŭtoro.

**dikaj literoj** (se ne eblas uzu ondan substrekon sur manuskripto [atentu ! inverso de la antaŭaj instrukcioj] aŭ per ASCII per komputila teksto \4 por komenci kaj \3 por fini) :
- aparte grava elemento substrekenda
- notinda eco, nekutima notinda kvalifiko
- titolo de paragrafo

*kursivaj literoj* (se ne eblas uzu sur manuskripto rektan substrekon [sama atentigo !] aŭ per ASCII \< kaj \> aŭ alia kodo anoncita de vi) :
- interkrampe : prononco (ĉio en minuskloj)
- en la teksto aŭ interkrampe : titolo aŭ frazo en la originala lingvo

KAPLITEROJ :
- vorto en alia lingvo, klarigita poste, escepte se temas pri indiko de prononco de ĵus menciita vorto en la originala nelatina skribo.

***Propraj nomoj :*** Ili estu preferinde notataj nacilingve (t.e. en la originala lingvo). Post la unua apero, oni indiku interkrampe la prononcon kiam ĝi estas ne kutima kaj la proponitan Esperantigon [bonvolu kontroli ie !] por uzo en derivaĵoj (ekz-e kalvinana, danteska, kartezia, marksisma). Por indiki la prononcon, oni uzu la Esperantan alfabeton, kaj aliajn signojn por ne-esperantaj sonoj (proksimume laŭ la internacia fonetika alfabeto) : ö, ü (franca **u**), θ (greka theta por angla **th** aŭ hispana **c, z**), ç (germana **ch** de **ich**), supra tildo aŭ streketo por nazaligo de vokaloj, (ekz-e õ, ã).
***Geografiaj nomoj :*** La urboj estu notitaj nacilingve kaj la landoj laŭ la listo de la Akademio (escepte en kazo de grava kontesto).
***Bibliaj nomoj :*** Ni uzu tiujn de la *Londona* Biblio.

**LINGVO :** La plej simpla kiel eble ! Ne uzu longajn frazojn.

EVANGELIAJ KAJEROJ

*Longo* : por **DIA REGNO** : de 30 ĝis 120 linioj
por ***Evangeliaj Kajeroj*** : de 100 ĝis 300 linioj por la petataj artikoloj
de 4 ĝis 100 linioj por liberaj kontribuoj.

*Ilustraĵoj* : Por ilustri ambaŭ revuojn, vi povas serĉi desegnojn, fotojn (tamen atentu pri la eblaj kopirajtoj !) aŭ pli bone fari **mem**.

NE FORGESI :

- Meti la naci-lingvajn nomojn kaj la prononcojn, la referencojn.
- Por **Evangeliaj Kajeroj** kunsendi vian biografieton, kiam vi sendas la *petatan* artikolon.
- Konservi duoblaĵon de la manuskripto en kazo de redaktoraj demandoj, aŭ en kazo de **poŝta perdo**. En kelkaj landoj estas tre utile sendi la manuskripton registrite.
- Por **DIA REGNO**, mi petas la aŭtorojn de la regulaj rubrikoj sendi la tekston por alveno ĉirkaŭ la 15-a de ĉiu monato.

***baldaŭaj eblaj temoj por Evangeliaj Kajeroj*** :

- Paco, justeco (7)
- La peza eklezia historio
- La originoj : ĉiama serĉo
- Evangelio kaj kulturoj
- Kristanismo en literaturo kaj artoj
- Feliĉo
- La Sankta Spirito

Ĉu vi havus ion por proponi ?

# ABONOJ

Abono por du numeroj, t.e. unu jaro : 70 FRF (ECU 10)
(vi nepre indiku por kiu jaro, aŭ ekde kiu numero).

al *Philippe Cousson, 26 Rue de Pré Ventenet, 86340 Nouaillé-Maupertuis, Francio.*
per poŝta konto, Philippe Cousson, 244 45 X, Limoges, Francio,
aŭ per internacia poŝta mandato en FRF,
aŭ per 16 internaciaj respondkuponoj.

aŭ al **Aŭstrio**, *Heinz Platzer, Brünnerstr. 107-109/2/1, 1210 Wien*
öPSK-konto 3675.724, Heinz Platzer
**Belgio**, *Jacques Lemaire, r. des Déportés 100, 6180 Courcelles*
konto 001-0405933-64
**Britio**, *Thomas Neil, 82 Glasgow Rd, Kilmarnock, KA3 1UN*
national giro, FEBC, 65274 0006
**F.R. Germanio**, *Sr Theotima Rotthaus, 7794 Wald*
Sparkasse Meßkirch K-tonummer 9434, BLZ 693 520 60
**Irlando**, *Maire Mullarney, Mill H., Whitechurch Rd, Rathfarnham, Dublin 14*
**Israelo**, *Esperanto Centro, P.O. Box 23 180, 91231 Jerusalem*
**Italio**, *Centra Oficejo de IKUE, v. F. Berni 9, 00185 Roma*
CCP, Centra Oficejo de IKUE, 23290000
**Nederlando**, *Leen Hordijk, v. Hogendorplaan 4, 3135 CD Vlaardingen*
post giro, KELI, 5506132
**Svedio**, *Arne Lundkvist, Skohornbacken 73, 126 39 Hägersten*
poŝtĝirkonto, Kristliga Esperantoförbundet, 9 14 39-0
**Svislando**, *Lina Reutemann, Iddastr. 34, 9008 St Gallen*
poŝta ĉekkonto, KELI svisa sekcio (Z en), 80-52203-8 Zürich
**Usono**, *Cornelius McKown, 460 Orlando Ave., State College, Pa 16803*

aŭ al UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO, Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando, pere de la konto **phco-m**.
(vidu en la jarlibro de UEA 1989, ĉe la paĝo 34)

Ni daŭre serĉas perantojn en aliaj landoj.

Vi kompreneble povas donace aboni iun alian, kiu cetere havus problemon por sin aboni.

## ARTIKOLOJ


Franco GRILLI : Ekumenismo : amo al Dio kaj proksimulo 3

Jelly KOOPMANS : Por ke la mondo kredu 9

Cyril HORáK : Interkonfesia dialogo : amo kaj vero 21

Gerrit BERVELING : Neniu vidis Dion, eklezia diverseco estas do necesa 33

David FEATHERSTONE : Kunlaboro pere de la Biblio 39

Cvetan SIRMANOV : Per la glavo ambaŭtranĉa kaj reagoj (el *Dia Regno*) 43

Battista CADEI : La Dua Vatikana Koncilio kaj ekumenismo 47

Th. Wilhelm TEICH : Ekumenismo : atentu ! 55

Alain MARTIN kaj René GIRAULT : Duvoĉe pri la Dombes-grupo 59

Ekumena situacio en Ĉeĥoslovakio 63

Instrukcioj por kunlaborantoj 66


prezo : 35 FRF (ECU 5)